


The image shows the front cover of a book. The spine and the corners are bound in a dark green, textured cloth. The main part of the cover is decorated with a marbled paper pattern. The pattern consists of irregular, organic shapes in shades of tan and light brown, set against a darker brown background, creating a cellular or stone-like appearance. In the bottom right corner, the letters "BN" are printed in a dark, sans-serif font.

BN







T. 849.929

3

HENRYK SIENKIEWICZ

---

# ŜI, LA TRIA

Humora rakonto el la vivo de artistoj

KUN PERMESO DE L' AŬTORO


tradukis

Antoni Grabowski




1913

ELDONO DE JAN GÜNTHER  
VARSOVIO



SI, LA TRIA





HENRYK SIENKIEWICZ

---

# ŜI, LA TRIA

Humora rakonto el la vivo de artistoj

KUN PERMESO DE L' AŬTORO

tradukis

Antoni Grabowski



1913

ELDONO DE JAN GÜNTHER  
VARSOVIO

BIBLIOTEKA  
BN  
NARODOWA

A

I,849.929



Drukarnia L. Bogusławskiego, Warszawa, Świętokrzyska 11.

1945 K 498/3

## I.

La laborejo, en kiu ni kune loĝis kaj pentris kun Svjatecki, estis nepagita, unue pro tio, ke ni ambaŭ havis kune ĉirkaŭ kvin rublojn, kaj due, ĉar ni sentis tute sinceran abomenon al loĝej-pagado.

Nin pentristojn oni nomas malŝparuloj, sed mi, ekzemple, preferas fordrinki la monon, ol forjeti ĝin pagante la mastron.

Kio koncernas nian mastron, li ne estis malbona homo, kaj, krom tio, ni trovis kontraŭ li rimedon.

Kiam, kutime matene, li venis memori la luopagon, tiam Svjatecki, kiu dormis sur planko, sur pajla matraco, kaj kovris sin per turka kurteno, uzata de ni kiel fono al portretoj, leviĝis duone kaj parolis per tomba voĉo:

— Bone, ke mi vin vidas, ĉar mi sonĝis, ke vi estas mortinta.

La mastro, kiu estis superstiĉa kaj videble timis la morton, tuj konfuziĝis eksterordinare. Tiam Svjatecki jetiĝis dorse sur la pajlsakon, etendis la krurojn, kunmetis la manojn sur la brusto, kaj parolis plu:

— Tiel mi vin vidis, kiel nun: vi havis blank-

ajn gantojn, kun tro longaj fingrujoj, kaj lak-gamaŝojn; cetero vi ne estis tre ŝanĝita.

Tiam mi aldonadis miavice:

— Jafoje tiaj sonĝoj ne efektiviĝas.

Ŝajnas, ke tiu „iafoje“ malesperigis nian mastron. Ĉiam finiĝis tiel, ke li, kolerigite, brufermis la pordon, kaj ni poste aŭdis, kiel li malsupreniris po kvar ŝtupoj je unu fojo, malbenante la tutan mondon. La honesta animo ne volis tamen sendi al ni la juĝan ekzekuciiston.

Laŭvere ne multo estis forprenebla; verŝajne la mastro konkludis, ke en tiun-ĉi laborejon kaj la apudan kuirejton transloĝiĝos aliaj pentristoj, kaj estos same, aŭ pli malbone.

Sed la akraĵo de nia rimedo malakriĝis post kelka tempo. La mastro alkutimiĝis al la penso pri la morto. Svjatecki intencis ĝuste tiam pentri tri bildojn laŭ maniero de Würtz, s. t. „Morto“, „Entombigo“ kaj „Vekiĝo el letargio“. Kompreneble en ĉiuj pentraĵoj estis prezentota nia dom-posedanto.

Tiaj tombaj aferoj estas la specio de Svjatecki, kiu, laŭ sia propra esprimo, pentras: „kadavrulojn“, „kadavrinojn“ kaj „kadavridojn“. Kredeble pro tio neniu volas aĉeti liajn bildojn, ĉar cetero li havas talenton. Li ĵus sendis en la parizan Salonon du „kadavrulojn“, kaj ĉar ankaŭ mi sendis miajn „Judojn apud Vistulo“, kiujn en la katalogo de l'Salono oni baptis „Hebreoj super riveroj de Babilono“, do ni atendis senpacience la verdikton de la jury (juĝantaro).

Nature Svjatecki antaŭvidis, ke ĉio estos plej malbona, ke la jury konsistas el efektivaj idiotoj,

kaj, se ĝi eĉ ne konsistus el idiotoj, mi estas idioto, niaj pentraĵoj estas idiotaj, kaj ilia premiado estus la plejsupro de idioteco.

Kiom da sango tiu simio malbonigis al mi dum la du jaroj, kiam ni loĝis kune, tion mi ne scias priskribi.

La tuta ambicio de Svjatecki estis tio, ke oni lin opiniu morala „kadavrulo“. Li ŝajniĝas interalie drinkulo, kiu li ne estas. Li enverŝas en sin du aŭ tri kaliketojn da brando kaj rigardas, ĉu ni vidas tion, kaj se li ne estas certa, li puŝas iun el ni per kubuto, kaj rigardante malserene, demandas per voĉo kvazaŭ subtera:

— Jen, kiel malalten mi jam falis... jes?... ĉu ne vere?

Ni al li respondas, ke li estas malsaĝa. Tiam li furioziĝas, kaj per nenio oni povas lin malbonhumorigi pli, ol kiam oni montras malfidon je lia morala falo. Cetere li estas bubo honesta ĝis la ostoj.

Foje ni perdis la vojon en la montaro, en Salzkammergut, ĉirkaŭ Zell am See.

Ĉar noktiĝis kaj estis facile rompi la kolon, do Svjatecki diris al mi:

— Aŭskultu, Vladek, vi havas pli grandan talenton, do estus pli granda domaĝo, se vi pereus. Mi iros antaŭe... Se mi malsuprenfalos, vi sidos sur via loko ĝis la mateno, kaj matene vi jam iel helpos al vi.

— Vi ne iros antaŭe, — mi respondas, — sed mi iros antaŭe, ĉar mi havas pli bonajn okulojn.

Tiam diras Svjatecki:

— Se mi ne rompos la kolon hodiaŭ, mi mal-

graŭ tio trovos mian finon en ia kanalo... estas por mi tute egale.

Ni komencas disputi.

Dume fariĝas malhele, kiel en kelo. Fine ni interkonsentas, ke ni tiros lotojn. Ni lotas.

Svjatecki eltiras la nodon kaj marŝas antaŭen. Ni iras sur monta dorso. Komence ĝi estas sufiĉe larĝa, poste ĉiam pli mallarĝa. Kiom ni povas konjekti, dekstre kaj maldekstre estas abismoj, certe senfundaj.

La dorso fariĝas ankoraŭ pli mallarĝa, kaj, kio estas pli grava, pecetoj de putrintaj rokoj forŝoviĝas el sub niaj piedoj.

— Mi iras kvarpiede, ĉar alie ne estas eble! — diras Svjatecki.

Efektive, alie ne estis eble, do ni malsupreniĝas sur la manojn kaj iras plu, kiel du ĉimpanzoj.

Sed baldaŭ montriĝas, ke ankaŭ tio taŭgas nenion. La roka dorso fariĝas ne pli larĝa ol dorso de ĉevalo. Svjatecki sidiĝas rajde, mi malantaŭ li, kaj, apogante nin per manoj, ni ŝoviĝas antaŭen, kio eksterordinare malutilas al niaj vestaĵoj.

Post kelka tempo mi aŭdas la voĉon de Svjatecki:

— Vladek?

— Kion do?

— La dorso finiĝis.

— Kio sekvas?

— Malpleno... certe abismo!

— Prenu do ŝtonon kaj ĵetu... ni aŭskultos, ĉu ĝi falas longe.

En la mallumo mi aŭdas, kiel Svjatecki palpas

per la manoj por trovi peceton da putrinta roko, kaj poste diras:

— Mi jetas... aŭskultu!

Ni ambaŭ streĉas la orelojn.

Mallaŭto!

— Vi aŭdis nenion?

— Nenion!

— Jen ni aranĝis nin bele! devas esti ĉirkaŭ cent klaftoj.

— Ĵetu ankoraŭ unu fojon!

Svjatecki trovas pli grandan rok-peceton kaj jetas.

Nenia resonado.

— Ĉu tie estas nenia fundo? — diras Svjatecki,

— Nenio helpas! ni sidos ĝis mateno.

Kaj ni sidas. Svjatecki jetas ankoraŭ kelke da ŝtonoj; ĉio estas vana. Pasas unu horo, la dua, fine mi aŭdas la voĉon de Svjatecki:

— Vladek, vi ne ekdormetu... ĉu vi ne havas cigaredon?

Montriĝas, ke cigaredojn mi havas, sed la alumetojn foruzis ni ambaŭ. Malespero! Povas esti la unua horo nokte, aŭ iom malpli.

Komencas pluveti. Ĉirkaŭe estas nepenetrebla mallumo. Mi konvinkiĝas, ke vivante inter homoj, en urbo aŭ en vilaĝo, ni havas nenan ideon pri tio, kio estas mallaŭto. La mallaŭto, kiu nin ĉirkaŭas, eĉ zumas en la oreloj.

Mi aŭdas preskaŭ, kiel la sango rondiras en miaj vejnoj, kaj la batadon de la propra koro mi aŭdas bonege.

Komence nia situacio interesas min.

Sidi dum silenta nokto sur roka dorso, kiel sur

ĉevalo, ĝuste super nesondebla abismo, tio ne okazas ja facile al iu ĉefurbano; sed baldaŭ fariĝas malvarme, kaj krom tio Svjatecki komencas filozofi:

— Kio estas la vivo? la vivo estas simple pork-eco. Oni diras: la arto, la arto! Min kune kun la arto... Simia imitado de la naturo kaj krom tio malnoblaĵo... Mi vidis ja dufoje la Salonon. Oni alsendis tiom da bildoj, ke el tiu tolo oni povus fari sufiĉe da matracoj por ĉiuj judoj en la mondo, kaj kio estis tie? La plej malnobla flatado al gustoj de butikistoj, ĉio prikalkulita por komerco aŭ por plenŝtopi ventrojn. Prostitucio de arto, nenio pli! Se tie estus arto, tiam la paralizo ĝin fulmetrafus; feliĉe, vera arto ne ekzistas en la mondo... estas nur la naturo. Povas esti, ke la naturo estas ankaŭ porkeco... Plej bone estus salti jen tien... kaj fari la finon. Mi farus tion, se mi havus brandon, sed ĉar mi ne havas brandon, mi sekve tion ne faros, ĉar mi ĵuris al mi, ke sobre mi ne finos.

Mi alkutimiĝis al la babilado de Svjatecki, tamen, meze de tiu-ĉi mallaŭto kaj devojĝo, en malvarmo, en mallumo, super abismo, liaj vortoj agordis ankaŭ min malserene. Feliĉe, ke babilinte sufiĉe, li ĉesis. Li jetis ankoraŭ kelke da ŝtonoj, ripetis ankoraŭ kelkfoje: „Eĉ ne aŭdiĝas!“ -- kaj poste ni silentis dum ĉirkaŭ tri horoj.

Ŝajnis al mi, ke baldaŭ jam tagiĝos, kiam subite ni ekaŭdis super niaj kapoj grakadon kaj bruon de flugiloj.

Estis ankoraŭ mallume, kaj mi nenion povis ekvidi, sed mi estis certa, ke jen agloj komencas rond-flugi super la abismo: „gra! gra!“ aŭdiĝis ĉiam



pli forte, supre en la malhelo. Mirigis! min tio, ke aŭdiĝis tiom da voĉoj, kvazaŭ transflugus tutaj legioj da agloj. Ĉiuokaze ili antaŭanoncis la tagon.

Efektive, post kelka tempo mi ekvidis miajn manojn, apogitajn sur la roka bordo; poste montriĝis al mi la konturoj de la dorso de Svjatecki, tute kiel nigra silueto sur iom malpli nigra fono. Tiu fono paliĝis ĉiumomente. Poste belega, pal-argenta nuanco komencis tralumi sur la roko, sur la dorso de Svjatecki kaj ĝi saturis ĉiam pli la malhelon; tute same, kvazaŭ iu alverŝadus al ĝi arĝent-koloran fluidaĵon, kiu ensorbiĝadis en ĝin, miksis sin kun ĝi, faris ĝin el nigra — griza, el griza — perlkolora. En tio estis samtempe ia krudeco kaj humideco; ne nur la roko, sed ankaŭ la aero ŝajnis esti malseka.

Ĉiumomente fariĝas pli lumplene.

Mi rigardas, penas fiksi en mia memoro tiujn ŝanĝojn de la nuanco, kaj iomete mi pentras en la animo, kiam subite mi aŭdas la ekkrion de Svjatecki:

— Fi! idiotoj!

Kaj lia dorso malaperas el miaj okuloj.

— Svjatecki! — mi krias — kion vi faras!

— Ne kriaĉu! rigardu!

Mi kliniĝas, rigardas — kio montriĝas? Jen, mi sidas sur roka dehakaĵo, eniĝanta en herbejon, kiu kuŝas eble unu metron pli malsupre. La muskoj mallaŭtigis la resonon de ŝtonoj, ĉar cetere la herbejo estas tute ebena; malproksime estas videbla la vojo, sur ĝi la kornikoj, kiujn mi opiniis agloj. Ni bezonis nur malsuprenlasi la piedojn for de la roko, por iri tute trankvile hejmen.

Anstataŭ tio ni estis sidantaj sur la roka de-  
hakaĵo kaj ni klakis per dentoj dum la tuta nokto.

Mi ne scias pro kio, jen nun, kiam ni en la la-  
borejo atendis kun Svjatecki la alvenon de la mastro,  
tiu aventuro, de post kiu pasis jam ĉirkaŭ unu jaro  
kaj duono, rememorigis al mi tiel, kvazaŭ ĝi estus  
okazinta hieraŭ.

Tiu rememoro plenigis min per stranga espero  
kaj kuraĝo, do mi diris tuj al Svjatecki:

— Vi memoras, Antek, kiel ni pensis, ke ni  
sidas super abismo, kaj montriĝis, ke antaŭ ni estis  
ebena vojo. Tiel povas esti ankaŭ nun. Jen ni estas  
malriĉaj, kiel ratoj en preĝejo, la mastro volas nin  
forekspedi el nia laborejo, dume ĉio povas aliiĝi.  
Eble nun malfermiĝos ia kluzo kun gloro kaj mono?

Svjatecki sidis ĝuste tiam sur sia matraco kaj  
surmetis boton, murmurante ĉe tio, ke la vivo kon-  
sistas el surmetado de botoj matene kaj el ilia ves-  
pera fortirado, kaj ke nur tiu estas prudenta, kiu hav-  
as la kuraĝon pendigi sin, kion li, Svjatecki, ĝis nun  
ne faris ekskluzive pro tio, ĉar li estas ne nur plej  
granda malsaĝulo, sed krom tio malnobla senkuraĝulo.

La eksplodo de mia optimismo interrompis lian  
meditadon, do li levis sur min siajn fiŝ-okulojn kaj diris:

— Vi precipe havas motivon por ĝoji; antaŭ-  
hieraŭ Suslovski forekspedis vin el sia domo kaj el  
la koro de sia filino, kaj hodiaŭ la mastro eljetos vin  
el la laborejo.

Domaĝe! Svjatecki diris la veron. Ankoraŭ an-  
taŭ tri tagoj mi estis la fianĉo de fraŭlino Kazimira  
Suslovskaja, kaj jen mardon matene... jes! mardon! mi  
ricevis de ŝia patro la sekvantan leteron:

„Amata Sinjoro!

Nia filino, subiĝante al persvado de la gepatroj, konsentas rompi la ligon, kiu por ŝi estus malfeliĉo. Ŝi povus ĉiam trovi rifuĝon sur la sino de la patrino kaj sub la tegmento de la patro, sed estis ĝuste la devo de ni gepatroj malebligi tiun-ĉi ekstremon. Ne tiom via pozicio materiala, kiom via facilanima karaktero, kiun vi, malgraŭ ĉiuj penoj, kaŝi ne povis, inklinigas nin kaj nian filinon, redoni al vi la parolon kaj interrompi pluajn rilatojn kun vi, kio cetere ne ŝanĝos nian por vi favorecon.

Kun respekto

Heliodor Suslovski.

e. (stinta) ĉefo en e. trezorkomisio de P. R.“

Jen la teksto de la letero...

Ke el mia materiala pozicio oni povus kudri botojn por hundo, tion mi pli-malpli konsentas, sed kion tiu patetika gorilo riproĉas al mia karaktero, tion mi vere ne komprenas.

La kapo de Kazja rememorigas la tipojn el la direktoriato, kaj belege estus, se ŝi volus frizi sin ne laŭ la modo hodiaŭa, sed laŭ la tiama. Mi provis eĉ peti pri tio, cetere vane, ĉar ŝi ne komprenas tiujn aferojn. Sed la koloreco de ŝia vizaĝo estas tiel varma, kvazaŭ Fortuni ŝin estus pentrinta.

Jam por tio sola mi amis ŝin sincere, kaj la unuan tagon post la ricevo de la letero de Suslovski mi havis la humoron de venenito. Nur la duan tagon, vespere, mi sentis min iom pli bone, ĉar mi estis dirinta al mi: se ne, do ne! Toleri mian sorto-

baton helpis al mi plej multe la cirkonstanco, ke mi havis la kapon okupitan per la penso pri la Salono kaj miaj „Judoj“. Mi havis la konvinkon, ke mia bildo estas tute bona, kvankam Svjatecki profetis, ke oni ĝin eljetos eĉ el la antaŭvestiblo de l' Salono.

Mi komencis ĝin pentri ankoraŭ antaŭ unu jaro:  
Estis tiel:

Mi iras vespere apud la Vistulo kaj rigardas: jen rompiĝis riversĥipeto, ŝarĝita per pomoj. La strataj buboj elkaptas la pomojn el la akvo, kaj apud la bordo de l' rivero sidas tuta juda familio, en tia mal-espero, ke ili eĉ ne lamentas, sed interplektis la manojn kaj rigardas la akvon kiel statuoj.

Estas maljuna judo, patriarko-mizerulo, maljuna judino, juna judo, koloso kiel Maŝabeo, junulino, iom lentuga, sed kun granda karaktero en la desegno de la nazo kaj buŝo, fine du judidoj.

Vesperigis; la rivero havas kuprokolorajn rebrilojn — vere mirindajn. La arboj sur la Saksa Insuleto staras tute en la ĉielruĝo, plue sur la Insuleto brilas la larĝe disverŝita akvo kun nuancoj ruĝaj, nuancoj de ultramaro, nuancoj preskaŭ ŝtorkoloraj, aŭ transirantaj en purpuron aŭ violkoloron. La aera perspektivo — volupto! La transiro de unuj nuancoj al aliaj estas tiel nekaptebla kaj tiel mirinde bela, ke la animo ekstaziĝas — ĉirkaŭe estas mallaŭte, lumplene, trankvile. Tia melanĥolio estas super ĉio, ke oni povus hurli — kaj jen tiu grupo malĝoja, sidanta tiel, kvazaŭ ili ĉiuj de la infana aĝo pozadus en pentristaj laborejoj...

Tuj lumiĝis en mia kapo: jen mia bildo!

Mi havis ĉe mi skatoleton kaj kolorilojn, ĉar

sen ili mi ne eliras el domo, kaj senprokraste mi komencis skizi, ankoraŭ antaŭe dirinte al la judoj:

— Sidu tiel, eĉ ne moviĝu! — rublon al ĉiu antaŭ ol krepuskiĝos.

Miaj judoj tuj komprenis la aferon kaj sidis, kvazaŭ enkreskinte en la teron. Mi skizas, skizas! La buboj eliris el la akvo kaj baldaŭ mi aŭdis malantaŭ mi:

— Pentristo! pentristo! li diras, ke li trovis, kaj li estas ŝtelisto!

Sed mi ekparolis al ili en ilia strat-buba lingvo kaj mi akiris tuj ilian favoron; ili eĉ ĉesis jetadi pecetojn da ligno sur la judojn, por ne difekti mian laboron.

Dume, en mia grupo ekregis neatendite bona humoro.

— Judoj! — mi krias: — malĝoju! — Kaj la maljunulino respondas:

— Pardonpetante la sinjoron pentriston, pro kio ni devas malĝoji, kiam la sinjoro promesis al ĉiu el ni po unu rublo? Tiu malĝoju, kiu profiton ne havas!

Mi devis minaci al ili, ke mi ne pagos.

Mi tamen skizis dum du vesperoj, poste ili pozis al mi ankoraŭ du monatojn en la laborejo. Svjatecki diru, kion li volas, sed la pentraĵo estas bona, ĉar tute ne malvarma; en ĝi estas sincera vero kaj multege da naturo. Mi lasis eĉ la lentugojn al la juna judino. La vizaĝoj povus esti pli belaj, sed ne povas esti pli veraj kaj havi pli da karaktero.

Mi tiel multe pensis pri tiu bildo, ke mi pli facile toleris la perdon de Kazja. Do, kiam Svjatecki

rememorigis ŝin al mi, ŝajnis al mi, ke tio okazis jam antaŭ tre longa tempo. Dume Svjatecki surmetadis la duan boton kaj mi komencis prepari la samovaron.

Venis kun bulkoj la maljuna Antonedzino, al kiu Svjatecki de unu jaro vane konsilas, ke ŝi pendigu sin — kaj ni komencis trinki la teon.

— Pro kio vi estas hodiaŭ tiel kontenta? — demandas min Svjatecki malafable.

— Ĉu mi scias! Vi vidis, ke okazos al ni io eksterordinara.

En tiu-ĉi momento ni aŭdas la kraketadon de la ŝtuparo, kiu kondukas al la laborejo.

— La mastro! jen via eksterordinaraĵo! — diras Svjatecki.

Tion dirinte, li eltrinkas sian teon, tiel varmegan, ke eĉ larmoj aperas en liaj okuloj; li forsaltas el sia seĝo, kaj ĉar nia kuirejeto havas transirejon, do li kaŝas sin en la laborejo malantaŭ la kostumoj kaj vokas spiregante el sia rifuĝejo:

— Mia karulo! li vin amas treege, parolu kun li!...

— Li ne scipovas vivi sen vi! — respondas mi, kurante al la kostumoj — parolu do vi!

Subite malfermiĝas la pordo kaj eniras — kiu? Ne la mastro, sed la gardisto de la domo, en kiu loĝas gesinjoroj Suslovski.

Ni elkuras el malantaŭ la kostumoj.

— Mi alportis por la sinjoro leteron — diras la gardisto.

Mi prenas la leteron... Je Hermes! — de Kazja! — Mi disŝiras la koverton kaj mi legas, kio sekvas:

„Mi estas certa, ke la gepatroj pardonos al ni.

Venu tuj, malgraŭ la frua horo. Ni ĵus revenis el la Saksa ĝardeno, kie ni trinkis la akvon. K.“

Mi ne estas vere certa pri tio, kion nome la gepatroj volas al mi pardoni, sed mi ankaŭ ne havas la tempon pensi pri tio, ĉar mi estas treege mirigita...

Nur post momento mi transdonas la leteron al Svjatecki, kaj mi diras al la gardisto:

— Amiko! diru al la fraŭlino, ke mi tuj venos... Atendu... Mi ne havas etan monon, sed jen vi prenu tri rublojn (la lastajn!), ŝanĝu ilin, retenu al vi unu rublon, kaj al mi alportu la reston.

Dirante paranteze, mi konstatas, ke la monstro, preninte la tri rublojn, ne revenis plu. La fripono sciis, ke mi ne faros skandalon en la domo de Sulsowski'j, kaj li trouzis la situacion senhonte. Sed tiam mi eĉ ne atentis tion.

— Nu, kion vi diros? — mi demandis Svjatecki'n.

— Nenion! ĉiu bovido trovos sian buĉiston.

Rapidigante mian investigon, mi eĉ ne povis trovi por Svjatecki konvenan kaj ĝustan insulton.

## II.

Kvaronhoron pli malfrue mi sonoretas al Suslovski'j.

Malfermas al mi Kazja mem. Ŝi estas belega... Ŝi havas en si ankoraŭ la varmecon de l' dormo kaj la maten-freŝecon, kiun ŝi alportis el la ĝardeno en la faldoj de sia katuna, helblukolora vestaĵo. La ĉapelo, kiun ŝi deprenis, senordigis iom ŝiajn harojn. Ŝia vizaĝo ridas, la okuloj ridas, la humida buŝo ridas... Vera mateno! Mi kaptas ŝin je la manoj kaj komencas kisi ilin ĝis la kubutoj; ŝi klinas sin al mia orelo kaj demandas:

— Kiu amas do pli bone?

— Poste ŝi kondukas min je la mano antaŭ la vizaĝon de la gepatroj. La maljuna Suslovski havas la mienon de Romano, oferanta al morto pro patria la ununaskitan infanon; la patrino gutigas larmojn en la kafon, ĉar ambaŭ sidas ĉe la kafo. Sed ili stariĝas vidante nin, kaj paĉjo Suslovski ekparolas:

— La prudento kaj la devo ordonus al mi diri: ne! sed la koro de naskinto havas siajn rajtojn — se tio estas malforteco, Dio juĝu min pro ĝi.



En tiu-ĉi momento li levas la okulojn por pruvo, ke li estas preta respondi en okazo, se la ĉiela tribunalo komencos tuj skribi la protokolon. Mi ne vidis en mia vivo ion pli roman, krom la salami kaj la makaronoj, vendataj sur la Corso. La momento estas tiel solena, ke hipopotamo krevus pro kortuŝiteco. La solenecon pligrandigas ankoraŭ sinjorino Suslovskaja, dismetante la brakojn kaj parolante per plorema voĉo:

— Miaj infanoj! se al vi estos iam malbone en la mondo, rifuĝu tien-ĉi — tien-ĉi!

Tion dirante ŝi montras la sinon.

Mi ne estas tiel malsaĝa! Ne min oni logu en la rifuĝejon, tien, tien!... Se Kazja al mi proponus tie azilon, estus io alia. Malgraŭ ĉio mirigas min la honesteco de Suslovski'j kaj mia koro estas trople-nigita de dankemo.

Pro kortuŝiteco mi eltrinkas tiom da glasoj da kafo, ke eĉ Suslovski komencas maltrankvile rigardi la kafomaŝineton kaj la kremujon. Kazja alverŝas al mi senhalte kaj mi penas samtempe ekpremi ŝian piedeton sub la tablotuko. Sed ŝi retiras ĝin ĉiam, skuante ĉe tio nerimarkeble la kapon kaj ridetante tiel fripone, ke mi ne scias, kiel mi povis sidi tiel trankvile.

Mi sidas dum ĉirkaŭ unu horo kaj duono, sed fine mi devas forkuri, ĉar en la laborejo atendas min Bobĉjo, kiu prenas ĉe mi lecionojn de desegnado kaj ĉiufoje lasas al mi bileton kun blazona sigelaĵo; cetere, plej ofte mi perdas tiujn biletojn. Kazja kaj la patrino akompanas min en la antaŭĉambron, kio min kolerigas, ĉar mi volis, ke Kazja akompanu min sola. Kian buŝon ŝi havas!...

Mi devas iri tra la Saksa ĝardeno. Homoj, trinkinte tie la mineralan akvon, revenas ankoraŭ amase... Envoje mi rimarkas, ke ĉiuj haltas je mia vido. Mi aŭdas ĉirkaŭe la flustrojn: „Magorski! Magorski! jen li...!“ La fraŭlinoj, vestitaj en ĉiu-nuancajn katunojn, sub kiuj mirinde desegniĝas iliaj formoj, ekrigardas min tiel, kvazaŭ ili volus paroli: „eniru, la tabernaklo estas preta!“ Kio estas, pro diablo? ĉu mi estas tiel fama! — nenion mi komprenas.

Mi iras plu — ĉiam la samo... En la vestiblo, ĉe la ŝtuparo, mi trafas la mastron, kiel ŝipo rokon. Ve! luopago!

Sed la mastro proksimiĝas kaj diras:

— Mia sinjoro! Kvankam iafoje mi altrudas min, tamen kedu al mi, ke por vi mi havas tiom da... jen, permesu nur!

Tion dirinte, li kaptas min je la kolo kaj alpremas al sia brusto. Nu, mi komprenas. Kredeble Svjatecki diris al li, ke mi edziĝas, kaj li pensas, ke de nun mi regule pagos la loĝejon. Li pensu...

Mi kuras supren. Envoje mi jam aŭdas bruon paroladon ĉe ni. Mi enkuras. En la laborejo estas malhele pro fumo. Estas Julek Ĵisinski, Vacek Porterkjeviĉ, Franek Cepkovski, la maljuna Sludecki, Karminski, Vojtek Miĥalak, ĉiuj amuziĝas transsendante al si poŝtolude la elegantan Bobĉjon, sed ekvidinte min, ili lasas lin apenaŭ vivan en la mezo de la laborejo kaj komencas kriegi:

— Ni gratulas! gratulas! gratulas!

— Ni levu lin!

En la sama momento mi estas kaptita sur la brakojn kaj kelkan tempon ili jetadas min supren,

kriegante kiel aro da hurl-simioj; fine mi troviĝas sur la planko, dankas al ili, kiel mi povas, kaj mi anoncas, ke ĉiuj devas ĉeesti mian edziĝon, precipe Svjatecki, kiun mi jam antaŭe invitas, ke li estu mia fianĉ-amiko...

Sed Svjatecki levas la manojn kaj diras:

— Tiu-ĉi stultulo pensas, ke ni gratulas lin pro lia edziĝo.

Kaj pro kio vi gratulas?

— Kiel do? vi scias nenion? — demandas ĉiuj voĉoj.

— Mi scias nenion; do kion vi volas, pro ĉiuj diabloj?

— Donu al li la „Fluganton“! matenan numeron de la „Fluganto“ — krias Vacek Poterkjeviĉ.

Ili donas al mi la matenan numeron de la „Fluganto“, superkriante unu la alian: „rigardu la depeŝojn!“

Mi rigardas la depeŝojn kaj legas, kio sekvas:

„Propra telegramo de la „Fluganto“. La pentraĵo de Magorski: „Hebreoj super riveroj de Babilono“, ricevis la grandan oran medalon en la ĉitju-jara Salono. La kritiko ne trovas sufiĉe da laŭdaj vortoj por la genio de la majstro. Albert Wolff nomis la bildon „rivelajo“ (malkaŝo). Baron Hirŝ proponas 15.000 frankojn.

Mi svenas! savu! Mi stultiĝas tiel, ke mi ne scipovas ekparoli unu vorton. Mi sciis, ke mia bildo estis bona, sed pri tia sukceso mi eĉ ne revis.

La numero de la „Fluganto“ elfalas el miaj manoj.

Oni levas ĝin kaj legas al mi ankoraŭ el la lastaj sciigoj la sekvantajn komentariojn al la depeŝo.

Sciigo Ia. Ni informiĝas el la propra buŝo de la majstro, ke li intencas eksponi sian pentraĵon en nia siren-blazona ĉefurbo.

Sciigo IIa. Je la demando de l' vicprezidanto de l' komitato de la Societo por Akcelado de Belartoj, direktita al nia majstro, ĉu li intencas eksponi sian ĉefverkon en Varsovio, la majstro respondis: „mi preferus ne vendi ĝin en Parizo, ol ne eksponi en Varsovio!“ Ni esperas, ke tiujn-ĉi vortojn niaj posteuloj legos (Dio donu eble plej malfrue) sur la tombo de la majstro.

Sciigo IIIa. La patrino de nia majstro, post ricevo de la depeŝo el Parizo, grave malsaniĝis pro kortuŝo.

Sciigo IVa. Ni informiĝis en la momento, kiam la numeron de la gazeto ni transdonis al la presmaŝino, ke la patrino de nia majstro fartas pli bone.

Sciigo Va. Nia majstro ricevis la inviton, eksponi la pentraĵon, el ĉiuj ĉefurboj de Eŭropo.

La supermezuro de tiuj monstraj mensogoj rekonsciigas min iom. Ostŝinski, la redaktoro de la „Fluganto“, kaj kune eks-svatiĝanto al Kazja, kredeble freneziĝis, ĉar tio superas jam ĉian mezuron. Kompreneble, la bildon mi eksponos antaŭ ĉio en Varsovio, sed Ie pri tio mi parolis ankoraŭ al neniu; IIe la vicprezidanto de la Societo por Akcelado de Belartoj demandis min pri nenio; IIIe mi respondis al li nenion; IVe mia patrino mortis antaŭ naŭ jaroj; Ve mi ricevis el nenie la inviton pri ekspono de la bildo.

Kio estas pli malbona: momente mi ekpensas, ke, se la depeŝo estas tiel vera, kiel la kvin sciigoj

tiam adiaŭ... Ostŝinski, kiu antaŭ duonjaro, kvankam la gepatroj favoris lin, ricevis de Kazja rifuzon, eble intence volas min mistifiki, sed tiam „li pagos al mi per kapo sia, aŭ per simila io alia!“ kiel diras la teksto de iu opero. Tamen la kolegoj trankviligas min, ke la sciigojn Ostŝinski povis fabriki mem, sed la depeŝo devas esti vera.

Samtempe alvenas ankaŭ Staĥ Kĥosoviĉ kun la matena numero de la „Kuranto“. La depeŝo estas ankaŭ en la „Kuranto“. Mi ekspiras libere.

Nun komenciĝas la apartaj gratuloj.

La maljuna Sludecki, homo tre falsa kaj dolĉa kiel siropo, skuas mian manon kaj diras:

— Dio amata! mi kredis ĉiam je la genio de la kolego, kaj ĉiam mi defendis la kolegon... (mi scias, ke li nomis min azeno...) sed... Dio amata... eble la kolego ne deziras, ke tia fa-presto, kiel mi, nomu la kolegon kolego, tiam la kolego pardonu la malnovan kutimon, Dio amata...

Mi deziras al li en mia animo, ke li pendiĝu, sed mi ne povas respondi al li, ĉar en la sama momento Karminski fortiras min flanken kaj diras, mal-laŭte, sed tiel, ke li estu aŭdata:

— Eble la kolego bezonas monon, tiam la kolego diru, kaj mi tiam...

Kaminski estas konata inter ni pro sia komplezemo. De tempo al tempo li diras al iu el ni: se la kolego bezonas helpon, tiam la kolego diru, kaj tiam — ĝis revido!“ Kaj vere li havas monon. Mi respondas al li, ke, se mi ne trovos aliloke, tiam mi turnos min al li. Dume venas aliaj, sinceraj buboj, kiel oro, kaj ili ĉirkaŭpremas min, ke miaj flankoj doloras.

Fine proksimiĝas Svjatecki; mi vidas ke li estas kortuŝita, sed li kaŝas tion kaj diras malafable:

— Kvankam mi vidas, ke vi judiĝos, tamen mi vin gratulas.

— Kvankam mi vidas, ke vi idiotiĝas, tamen mi vin dankas — mi respondas al li, kaj ni ĉirkaŭprenas nin tutforte. Vaŝ Poterkjeviĉ memorigas, ke en lia gorĝo malsekiĝis. Mi ne havas eĉ unu groŝon, sed Svjatecki havas du rublojn, aliaj havas ankaŭ. Oni faras monkoklekton kaj punĉon... Oni trinkas je mia sano, jetas min ree supren, kaj ĉar mi al ili diras, ke kun Suslovski'j la afero estas riparita, do oni trinkas ankaŭ je la sano de Kazja. Subite proksimiĝas al mi Svjatecki kaj diras:

— Ĉu vi, juna idioto, pensas, ke ili ne legis la depeŝon antaŭ ol la fraŭlino al vi skribis?

— Ho, frapo! Kvazaŭ iu ekbatus mian kapon per bastonego. Unuflanke la horizonto plilumiĝas, aliflanke ĝi diable malheliĝas. De Suslovski'j oni povas atendi ĉion, sed mi ne supozis, ke Kazja estus kapabla al tia profitema kalkulado.

Tamen estas tre versimile, ke matene ĉe la mineral-akvoj ili tralegis la depeŝon kaj min alvokis tuj.

En la unua momento mi volas kuri al Suslovski'j kaj stariĝi antaŭ iliaj okuloj.

Sed mi ne povas forlasi la societon... Krom tio alvenas Ostŝinski, eleganta, malvarma, memfida, gantumita kiel kutime. La sagaco helradias el lia vizaĝo, ĉar li estas konata ruzulo.

Jam sur la sojlo li komencas svingi protekte la bastonon kaj diras:

Mi gratulas, majstro, ankaŭ mi i gratulas.

Tiun „mi“ li elparolas kun tia akcento, kvazaŭ lia gratulo signifus pli, ol la gratulo de iu alia.

Cetere povas esti, ke li estas prava...

— Kion vi elpensis! — mi vokas — vere, kiel vi min vidas tie-ĉi, nur unue el la „Fluganto“ mi sciigis pri ĉio.

Tio estas por mi indiferenta — diras Ostŝinski.

— Pri la ekspono de la bildo mi ankaŭ nenion parolis.

— Sed nun vi parolas — diras flegme Ostŝinski.

— Kaj li ne havas patrinon kaj lia patrino ne malsaniĝis! — vokas Vojtek Miĥalak.

Tio interesas min malmulte, — ripetas grave Ostŝinski, deprenante la duan ganton.

— Sed la depeŝo estas vera.

— Vera.

Tiu-ĉi certigo trankviligas min tute. Dankeme mi enverŝas por li punĉon. Li almetas la buŝon al la rando de l' glaso, eltrinkas gluton, kaj poste li diras:

— Antaŭe vian sanon, kaj la duan gluton mi trinkos, vi scias je kies sano?... Mi gratulas al vi duoble.

— El kie vi scias?

Ostŝinski movas la ŝultrojn.

— Ĉar Suslovski estis ja hodiaŭ antaŭ la oka horo en la redakcio.

Svjatecki komencas ion murmuri pri homoj malnoblaj ĝenerale, mi ne povas pli longe teni min kaj mi kaptas la ĉapelon. Ostŝinski eliras kun mi, sed mi forlasas lin envoje kaj post kelke da minutoj mi sonoretas la duan fojon al Suslovski'j. Malfermas al mi Kazja, la ĝepatroj ne estas hejme.

— Kazja! — mi diras severe — vi sciis pri la depeŝo?

— Mi sciis — respondas ŝi trankvile.

— Ha, — Kazja!

— Kion vi volas, mia kara? Ne miru je la gepatroj... Ili ja devas havi ian prudentan motivon, pro kiu ili konsentas je vi.

— Sed vi, Kazja?

— Kaj mi uzis la unuan okazon... Ĉu vi tion mallaŭdas, Vladdek?

En miaj okuloj klariĝas kaj ŝajnas al mi, ke Kazja estas tute prava. Ĝuste dirante, kial mi, alkuris tien-ĉi kiel frenezulo? Dume Kazja proksimiĝas kaj apogas la kapeton sur mian ŝultron; mi ĉirkaŭprenas ŝin; ŝi klinas la vizaĝeton flanken de mia ŝultro, fermas la okulojn, elŝovas sian rozkoloran beketon kaj flustras:

— Ne, ne Vladdek!... ne nun... post la edziĝo... mi petas vin!

Sekve de tiu-ĉi peto mi alpremas per mia buŝo ŝian beketon kaj ni restas tiel, ĝis kiam la spirado al ni tion permesas. La okuloj de Kazja fariĝas svenintaj... Fine ŝi kovras ilin kaj diras:

— Mi vin petis ja tiel, ke vi ne...

La riproĉo kaj la rigardo el sub la kovranta ĝin maneto kortuŝas min tiel, ke mi kisas ŝin la duan fojon. Kiam oni amas iun, oni havas nature pli grandan inklinon kisi lin, ol ekzemple bati... kaj mi amas Kazja'n senmezure kaj ĝis memforgeso, dum la vivo ĝis la morto, post la morto! Ŝi, aŭ neniu, jen mia lasta vorto!

Kazja esprimas per spireganta voĉo la timon,



ke mi ĉesos ŝin estimi. Plej kara kreaĵo! Kian sen-  
sencaĵon ŝi babilas. Mi trankviligas ŝin, kiel mi povas,  
kaj ni komencas paroli prudente.

Ni interkonsentiĝas, ke, se gesinjoroj Suslovski  
ŝajnigos, ke pri la depeŝo ili sciigis pli malfrue, mi  
ne komprenigos ilin, ke mi scias, kiel okazis la afero —  
poste mi adiaŭas Kazjon, promesinte al ŝi, ke mi ven-  
os vespere.

Mi devas kuri al la kancelario de la Societo por  
akcelado de belartoj; per ĝi mi povos plej facile in-  
terkompreniĝi kun la sekretario de la Salono.

---

### III.

Mi sendas la depeŝon kun deklaro, ke mi konsentas pri la prezo proponita de barono Hirŝ, sed ke antaŭe mi intencas eksponi la pentraĵon en Varsovio k. t. p.

Por elsendo de la depeŝo kaj por aliaj bezonoj mi prunteprenas la monon en la administracio. Oni donas al mi senhezite. Ĉio prosperas bonege.

En la „Fluganto“ kaj „Kuranto“ aperas miaj biografioj, en kiuj cetere ne troviĝas eĉ unu vorto vera, sed kiel diras Ostŝinski: „tio estas por mi indifera“. Oni volas enpresigi miajn portretojn kaj la reprodukon de mia pentraĵo. Bone!

Monon mi havos amase.

---

#### IV.

Post semajno mi ricevis la antaŭpagon de barono Hirŝ.

La tutaĵo estos elpagita, kiam la aĉetinto fariĝos posedanto de la pentraĵo, dume la komerca banko kalkulas al mi sur la tablon kvin mil frankojn en luidoroj. Dum mia tuta vivo neniam mi vidis tiom da mono. Mi revenas ŝarĝita kiel mulo...

En la laborejo estas kunveno. Mi disjetas miajn luidorojn sur la planko, kaj, ĉar ĝis nun mi neniam ruliĝis en oro, do mi komencas ruliĝi en oro. Post mi ruliĝas Svjatecki... Venas la mastro kaj pensas ke ni freneziĝis... Ni amuziĝas kanibale!

---

## V.

Ostŝinski diris al mi iun tagon, ke li sentas sin feliĉa, ricevinte rifuzon de Kazja, ĉar malfermiĝas antaŭ li perspektivo, pri kiu mi ne povas havi plej malgrandan ideon.

Mi estas pro tio tre kontenta, aŭ pli ĝuste, tio estas por mi tute indiferenta; cetere mi kredas, ke Ostŝinski scios aranĝi bone sian vivon.

Kiam li svatis sin pri Kazja, la gepatroj favoris lin, kaj precipe la patro Suslovski. Ostŝinski eĉ plene lin superpezis, ĝis tia grado, ke tiu Romano en lia ĉeesto seniĝadis de sia statueco. Kazja, kontraŭe, malamis lin de post la unua momento de interkoniĝo. Tio estis senkonscia antipatio, ĉar cetere mi estas tute certa, ke li ne malinklinigis ŝin per tio, per kio li forpuŝas de si min kaj ĉiujn, kiuj konas pli precize lian karakteron.

Li estas stranga homo, aŭ pli ĝuste dirante, stranga literaturisto.

Ekzistas certe ne nur ĉe ni, sed en ĉiuj pli grandaj centroj de literaturo kaj arto, homoj, pri kiuj

pensante, ni demandas nin malgraŭvole, el kie devenas ilia aŭtoritato.

Al ili apartenas mia amiko el la „Fluganto“. Kiu kredus, ke la sekreto de graveco de Ostŝinski, kaj la kaŭzo de lia intelekta ekzisto, estas tio, ke Ostŝinski ne ŝatas kaj ne estimas talentojn, precipe de verkistoj — kaj ke li simple vivas per ilia malŝatado... Li havas por ili la malestimon de homo, al kiu la korekteco de vivo, kelka tuja vigleco kaj granda sagaco certigas en la societa vivo konstantajn venkojn super ili.

Kaj oni devas lin vidi en kunsidoj, en artistaj kaj literaturistaj kunvenoj, dum jubileaj tagmanĝoj, kun kia indulgema ironio li traktas homojn, kiuj en la kreada sfero scipovas dekfoje pli ol li; kiel li ilin premas al la muro, kiel li ilin konfuzas per sia logiko, sia prudento, kiel li trudas al ili sian literaturan aŭtoritaton.

Svjatecki, kiomfoje li tion rememoras, vokas, ke oni al li donu lit-tabulon, per kiu li intencas frakasi la kapon de Ostŝinski, — sed min ne mirigas lia supereco. Homoj vere talentaj estas ofte mallertaj, timemaj, senigitaj de la tuja vigleco kaj de la mensa egalpezo... Sed nur, kiam vere talenta homo troviĝas en soleco, kun si sola, tiam subite ĉe liaj ŝultroj elkreskasflugiloj; Ostŝinski, en tiaj kondiĉoj kredible iras dormi, ĉar li havas absolute nenion por diri al si.

La estontenco faros inter tiuj homoj ordon, donos rangojn kaj difinos por ĉiu konvenan lokon. Ostŝinski estas tro sagaca, por ne scii tion, sed en sia animo li mokas pri tio. Por li sufiĉas, ke en la nuna mo-

mento li signifas pli, kaj ke oni konsideras lin pli, ol aliajn, pli bonajn ol li.

Ni, pentristoj, malhelpas lin malpli. Li faras tamen iafoje reklamon ankaŭ al verkistaj talentoj, se tion postulas la komercaj aferoj de la „Fluganto“ aŭ la konkurenco kun la „Kuranto“. Cetere li estas bona kamerado kaj homo aminda. Mi povus diri, ke mi lin ŝatas, sed...

La diablo forkaptu lin — sufiĉe pri Ostŝinski...

---

## VI.

Ili kaŭzos tion, ke mi iun fojon brufermos la pordon.

Kia komedio! De la tempo, kiam mi havas gloron kaj monon, Suslovski, spite al miaj propraj antaŭsupozoj, traktas min preskaŭ malestime. Li, lia edzino, ĉiuj parencoj kaj parencoj de Kazja, kondutas rilate al mi glacie malvarme.

La unuan vesperon Suslovski deklaris, ke se mi opinias, ke mia nova pozicio influis ilian agon, aŭ, se mi supozas — kion cetere mi vidigas — ke mi faras al ili favoron, tiam, kvankam ili estas pretaj oferi multe por la feliĉo de la infano, tamen eĉ tiu-ĉi unika infano ne povas postuli de ili, ke ili oferu sian homan dignon. La patrino aldonis, ke la infano sciis, kie serĉi tiuokaze rifuĝon. La bonkora Kazja provas min defendi, iafoje tre malafable, sed ili insidas ĉiun mian vorton.

Apenaŭ mi malfermas la buŝon, kiam Suslovski mordetas la lipojn, ekrigardas la edzinon kaj balancas la kapon, kvazaŭ li volus diri: „Mi sciis, ke tia estos la fino!“

Tiamaniere ili turmentas min ĉiutage, de mateno ĝis vespero.

Kaj oni imagu al si, ke ĉio-ĉi estas hipokriteco, ke tio havas ĝuste la celon, reteni min en la retoj, ke funde de l' koro ili aspiras miajn dekkvin-mil frankojn, kaj ke la afero estas urĝa por ili, same kiel por mi, kvankam niaj motivoj estas diferencaj.

Estas tempo fari finon.

Ili kaŭzis tion, ke ŝajnas al mi, ke efektive mi faris ion malnoblan, ricevinte la oran medalon kaj dekkvin-mil frankojn por la bildo.

---



## VII.

Venas la tago de mia fianĉiĝo.

Mi aĉetis belegan ringon laŭ la stilo Louis XV, kiu ne plaĉis al Suslovski'j, kaj eĉ al Kazja, ĉar en la tuta domo neniu komprenas ion pri vera arto.

Je Kazja mi devas ankoraŭ multe labori, por ekstermi en ŝi la burĝajn inkliojn kaj instrui ŝin senti artiste; sed ĉar ŝi min' amas, mi havas bonan esperon.

Al la fianĉiĝo mi invitis neniun, krom Svjatecki. Mi volis, ke li vizitu antaŭe gesinjorojn Suslovski, sed li asertas, ke kvankam li estas fizika kaj morala bankrotulo, tamen li ne malnobliĝis ankoraŭ ĝis tia grado, por fari vizitojn... Nenio helpos!

Mi preparas gesinjorojn Suslovski antaŭe, ke mia amiko estas eksterordinara strangulo, sed cetera genia pentristo kaj la plej honesta homo en la mondo.

Suslovski, sciĝinte, ke mia amiko pentras „kadavrulojn“, „kadavrinojn“ kaj „kadavridojn“, levas la brovojn, deklarante, ke ĝis nun li havis rilatojn kun homoj decaj, ke lia tuta oficista kariero estis senmakula, kaj ke li havas la esperon, ke „sinjoro Svja-

tecki“ bonvolos respekti la kutimojn, regantajn en honesta kaj modesta domo...

Mi konfesas, ke tiurilate mi ne estas libera de timo, kaj jam de la mateno mi militas kun Svjatecki. Li obstinas, ke li iros, lasante la pantalon-duonojn en la botoj. Mi persvadas, petas, petegas.

Fine li konsentas, sciigante, ke cetere li ne vidas motivon, pro kio li ne devus fariĝi arlekeno. Domaĝe, ke liaj botoj memorigas botojn de esploristoj el meza Afriko, ĉar la ciro ne tuŝis ilin de post la momento, kiam oni ilin alpörtis kredite de la batisto. Kion fari!

Pli malbone estas, ke la kapo de Svjatecki aspektas kiel monta supro, kovrita de arbaro, kiun trankuris uragano. Koncerne tion mi devas konsentiĝi, ĉar ne ekzistas en la mondo strigililo, kiu estus kapbla trakombi tiun-ĉi hartufon; sed, anstataŭe, mi devigas Svjatecki'n, ke li almenaŭ ne vestiĝu en bluzon, kiun li surhavas ĉiutage, sed surmetu surtuton. Li faras tion, sed ĉe tio li havas la mienon de unu el siaj kadavruloj kaj samtempe lin ekregas tomba humoro.

Sur la stratoj la homoj turnas sin, por rigardi lian tuberplenan bastonegon kaj la grandegan ĉirkaŭŝiritan ĉapelon, sed al tio mi jam kutimiĝis.

Ni sonoretas kaj eniras.

Jam en la antaŭĉambro atingas min la voĉo de la kuzo Jaĉkoviĉ, diskutanta pri troloĝateco. La kuzo Jaĉkoviĉ konstante diskutas pri tropopoliĝo, tio estas lia saĝeco. Kazja aspektas en siaj muslenoj kiel nubeto kaj estas belega... Suslovski en frako, la parencoj en frakoj, la maljunaj onkloj en silkaj roboj.

La eniro de Svjatecki faras impreson. Oni ob-

servas nin iom maltrankvile... Li rigardas malserene ĉirkaŭen kaj deklaras al Suslovski, ke certe li ne altrudus sin, „se ne estus tio, ke Vladek edziĝas, aŭ faras ion similan...”

La „ion similan“ estas akceptita plej fatale. Suslovski rektiĝas digne kaj demandas, kion sinjoro Svjatecki komprenas per „io simila“... Sinjoro Svjatecki respondas, ke tio estas por li tute indiferenta, sed ke „por Vladek“ li povus sin eĉ ŝmiri per lako, precipe se li scius, ke tio ne estas indiferenta por Suslovski... Mia estonta bopatro rigardas la edzinon, min, Kazja'n, per okuloj, en kiuj la mirego vetbatalas kun la skandaliĝo.

Feliĉe mi savas la situacion, kaj, escepte nekonfuzite, mi petas la estontan bopatron, ke li prezentu min al la familianoj, kiujn mi ankoraŭ ne konas...

Komenciĝas la prezentado, poste ni sidiĝas.

Kazja sidiĝas apud mi kaj lasas sian manon en la miaj. Mia Svjatecki rigardas sub la tablon... En la mallaŭto etendiĝas ĉiam pli laŭte la voĉo de Jaĉkoviĉ, kiu, ne havante antaŭan denton, ĉie, kie li devus elparoli „ĉ“ faras longan fajfon...

— Tio povas kaŭzi iam la plej terurajn malfeliĉojn por la tuta Eŭropo — diras Jaĉkoviĉ.

— Elmigrado... — diras iu flanke.

— La statistiko pruvas, ke la elmigrado ne malobligas la tropopoliĝon.

Subite Svjatecki levas la kapon kaj turnas siajn fiŝajn okulojn al la parolanto.

— Do oni devas enkonduki ĉe ni ĥinajn kutimojn — aŭdiĝas lia malserena basvoĉo.

— Permesu... kion, ĥinajn kutimojn?

— Ĉar en Ĥinujo gepatroj havas la rajton sufoki maltaŭgajn infanojn — do infanoj devus havi ĉe ni la rajton sufoki maltaŭgajn gepatrojn.

Fariĝis! La fulmo ekbatis, la kanapo ekĝemis sub la onkloj, kaj mi pereis. Suslovski fermas la okulojn kaj perdas por kelka tempo la parolkapablon. Silento.

Poste etendiĝas la tremanta pro teruro voĉo de mia estonta patro:

— Mia sinjoro, mi esperas, ke kiel kristano...

— Kial do mi devas esti kristano? — interrompas Svjatecki, balancante malbonaŭgure la kapon.

Dua fulmobato! La kanapo kun la onkloj komencas skuiĝi kiel en febro, kaj falas en abismon... Mi sentas, ke sub mi ankaŭ la tero malfermiĝas.

Ĉio estas perdita, ĉiu espero vana!

Subite eksplodas, bonsone kiel sonorileto, la rido de Kazja, post ĝi eksplodas per rido, ne sciante kial, Jaĉkoviĉ, post Jaĉkoviĉ eksplodas mi, ankaŭ ne sciante kial...

— Paĉjo! — vokas Kazja. — Vladjo antaŭsciigis vin, ke sinjoro Svjatecki estas tre originala... Sinjoro Svjatecki ŝercas, kaj mi scias, ke sinjoro Svjatecki havas patrinon kaj estas por ŝi plej bona filo!

Jen sagaca knabino estas mia Kazja! Ne nur ŝi elpensas, sed ankaŭ divenas, ĉar Svjatecki efektive havas patrinon kaj estas por ŝi bona filo.

Ŝia rido kaj la diritaj vortoj deturnis iom la atenton. Ankoraŭ pli deturnis la atenton la eniro de servisto kun vino kaj kuketoj. Tio estas la domgardisto, kiu forprenis de mi la lastajn tri rublojn, sed nun oni vestis lin en frakon kaj li prezentiĝas okaze kiel lakeo.

La okulojn li estas fiksinta en la pleton; la vitraĵo tintas, kaj li moviĝas antaŭen tiel malrapide, kvazaŭ li portus glason plenan de akvo.

Mi komencas timi, ke li ĉion faligos teren; sed feliĉe mia timo montriĝis vana...

Post momento la kalikoj estas plenigitaj.

Ni alpaŝas al la fianĉiga ceremonio.

Neplenaĝa kuzino tenas porcelanan teleron, sur kiu kuŝas du ringoj. Ŝiaj okuloj eliĝas pro sciemo kaj la tuta ceremonio faras al ŝi tiel evidentan ĝuon, ke ŝi eĉ supren-saltetas kune kun la telero kaj la ringoj. Suslovski leviĝas, ĉiuj stariĝas, kaj oni aŭdas la bruon de forŝovataj seĝoj.

Fariĝas silento. Mi aŭdas, kiel unu el la matronoj faras flustre la rimarkon, ke ŝi esperis, ke mia ringo estos „pli deca...“ Malgraŭ tiu rimarko la agordiĝo estas tre solena.

Suslovski havas la parolon:

— Miaj infanoj, akceptu la benon de gepatroj...

Kazja ekgenuas, genufleksas ankaŭ mi...

Kian mienon havas Svjatecki en tiu-ĉi momento, kian mienon li havas!?

Sed mi ne kuraĝas liu ekrigardi. Mi rigardas la muslinan robon de Kazja, kiu sur la kolorperdinta ruĝa tapiŝo formas tre belan makulon. La manoj de Suslovski kaj de sinjorino Suslovska apogiĝas sur niaj kapoj, poste mia estonta bopatro parolas:

— Mia filino! Vi havis la plej bonan ekzemplon en nia domo, kia devas esti la edzino por la edzo, do mi ne bezonas instrui vin pri la devoj, kiujn cetere la edzo al vi indikos (tion mi esperas!)... Sed mi turnas min al vi, sinjoro Vladislavo...

Tie-ĉi komenciĝas paroladeto, dum kiu mi kalkulas ĝis cent, kaj, kalkulinte ĝis cent, mi rekomencas de unu. Suslovski civitano, Suslovski oficisto, Suslovski patro, Suslovski Romano havas la okazon montri la tutan grandecon de sia animo... Vortoj: infano, gepatroj, devoj, estonteco, beno, dornoj, pura konscienco — zumas ĉirkaŭ miaj oreloj kiel aro da vespoj, ĉirkaŭsidiĝas mian kapon, pikas miajn suprecititajn orelojn, la kolon kaj la frunton...

Mi havas verŝajne la kravaton tro forte kunligitan, ĉar mi preskaŭ sufokiĝas. Mi aŭdas la ploron de sinjorino Suslovska, kiu min kortuŝas, ĉar ŝi estas esence honesta virino; mi aŭdas la tintadon de ringoj, tenataj sur telero per la supren-saltetanta kuzineto. Kristo-Sinjoro! Kian mienon tiu-ĉi Svjatecki nun havas?!...

Fine ni stariĝas. La kuzineto ŝovas la teleron ĝis miaj okuloj. Ni interŝanĝas kun Kazja la ringojn...

Uf! mi estas lacigita! Mi pensis, ke ĉio finiĝis, sed ne, ĉar Suslovski alvokas nin, ke ni iru peti pri beno ĉiujn onklojn.

Ni iras. Mi kisas ĉirkaŭ kvin manojn, similajn al cikoniaj piedoj... Ĉiuj onkloj esperas, ke mi ne trompos ilian fidon.

Kian fidon, je diablo, ili povis havi al mi? La kuzo Jaĉkoviĉ ĉirkaŭprenas min. Tute certe mia kravato estas tro forte kunligita.

Sed la plej granda malbono pasis. Malheliĝas... Oni enportas la teon.

Mi sidas apud Kazja kaj mi ĉiam ŝajnigas, ke mi ne vidas Svjatecki'n. Li, simio, maltrankviligas min ankoraŭ unu fojon, kiam, je la demando, ĉu li

ne enverŝos en la teon iom da arako, li respondas, ke arakon li trinkas kutime nur pobotele... Cetere la vespero finiĝas feliĉe.

Ni eliras. Mi enspiras per plena brusto la aeron. Efektive mia kravato estis tro forte kuntirita.

Ni iras kun Svjatecki silentante. Tiu-ĉi silentado fariĝas por mi tro peza kaj fine netolerebla. Mi sentas, ke mi devas ekparoli al Svjatecki, diri al li ion pri mia feliĉo, pri tio, kiel belege ĉio okazis kaj kiel mi amas Kazja'n... Mi prepariĝas, sed ne povas tion fari! Fine, jam proksime de la laborejo mi diras:

— Konfesu Svjatecki, ke tamen la vivo estas iafoje bela.

Svjatecki haltas, ekrigardas min malserene kaj diras:

— Pudelolo!

Dum tiu-ĉi vespero ni plu ne interparolis.

---

## VIII.

Semajnon post la fianĉiga vespero venis miaj „Judoj“ en la ekspozicion.

La pentraĵon oni lokis en aparta salono kaj la administracio prenas apartan pagon por la eniro. La duonon de la neta enspezo ricevas mi... En la ekspozicio estas, kiel oni diras, interpremo, de mateno ĝis vespero.

Mi estis tie nur unu fojon, sed oni rigardis min pli ol la bildon; do mi ne iros plu, ĉar kial mi devas vane koleriĝi.

Se mia bildo estus eĉ ĉefverko, ĝis nun ne vidita en la mondo, la publiko ankoraŭ preferos kontentigi tiun sciemon, pro kiu ĝi iros rigardi „Kraon“ aŭ hotentoton formangantan vivajn kolombojn.

Tia hotentoto estas ĉi-momente mi... Mi estus kontenta, se mi efektive estus pudelo. Sed mi estas tro pentristo, do kolerigas min tia humiligo de l' arto antaŭ moda vidindaĵo...

---



## IX.

Antaŭ tri semajnoj malmultaj homoj sciis pri mia ekzisto, sed nun mi komencas ricevi dekojn da leteroj, pligrandaparte amaj. El kvin certe kvar komenciĝas per la vortoj: „Eble, traleginte tiun-ĉi leteron, vi malestimos la virinon, kiu k. t. p.“ — Mi ne malestimos la virinon, se ŝi ĉesos trudi sin al mia animo.

Se mi ne amus Kazja'n, eble, vere dirante, mi ne movus la ŝultrojn pro tiu-ĉi torento da amsentoj.

Indignigas min precipe tio, kiel tia „nekonatino“ povas esperi, ke viro, ne vidinte ŝin antaŭe, sekvos blinde ŝian inviton. Levu antaŭe vian vualon, nekonata belulino! Tiam, vidinte vin, mi al vi diros... Ne! mi diros nenion, ĉar Kazja!...

Mi ricevis ankaŭ de iu grizhara amikino anoniman leteron, en kiu mi estas nomata majstro, kaj Kazja anserineto.

„Majstro, ĉu ŝi estas edzino por vi? (demandas mia grizhara amikino). Ĉu la elektitino estas inda de tiu, al kiu turniĝas la okuloj de la tuta lando? Vi estas viktimo de intrigo, k. t. p.“

Stranga supozo, kaj pli stranga estas ankoraŭ la postulo, ke mi edziĝu ne por kontentigi mian koron, sed por ravi la publikan opinion.

Eĉ la bedaŭrinda Kazja ĝenas ilin!

Ekzistas certe pli grandaj krimoj ol anonimaj leteroj, sed ne ekzistas pli granda... kiel esprimi tion bele?... Cetere malgravaĵo!

La dato de mia edziĝo ne estas ankoraŭ difinita, sed ĝi okazos baldaŭ.

Dume mi petos Kazjon, ke ŝi vestu sin belege, kaj mi kondukos ŝin en la ekspozicion.

Oni vidu nin kune...

Venis ankaŭ el Parizo du „kadavrujoj“ de Svjatecki.

La bildo estas titolita: „Lasta renkonto“ kaj ĝi prezentas junulon kaj junulinon kuŝantajn sur prosekcia tablo. Je l' unua rigardo la ideo klariĝas bonege. Oni vidas, ke la du mortintoj amis dum vivo unu la alian; ke ilin disigis la mizero, kaj kunigis la morto.

La studentoj, kliniĝintaj super la kadavroj prezentiĝas en la pentraĵo iom malmole; en la perspektivo de l' sekcejo estas eraroj, sed la „kadavrujoj“ estas pentritaj grandioze. Tiuj kadavroj kvazaŭ blovigas glacian malvarmon. En la „Salono“ la bildo eĉ ne ricevis laŭdan mencion, eble tial, ke ĝi estas terure malagrabla: tamen la kritiko laŭdis ĝin.

Inter nia pentristaro estas sendube multaj talentoj. Jen apud la kadavrujoj de Svjatecki eksponis Franek Cepkovski: „la Morto de Korecki“. Grandega forto kaj grandega individueco!

Svjatecki nomas Cepkovski'n idioto, unue pro

tio, ke Franek tondigas siajn fruntharojn egale kaj sian barbon kojnforme, due, ĉar li vestas sin laŭ la lasta modo, kaj trie, ĉar li estas treege bone edukita, ceremoniema kaj aludas sufiĉe ofte siajn alt-nobelajn parencojn.

Sed Svjatecki eraras...

La talento — estas tia birdo, kiu konstruas neston laŭplaĉe, foje en sovaĝa dezerto, alifoje en zorge fle-gata ĝardeno.

Mi vidis en Munĥeno kaj Parizo pentristojn, kiuj aspektis kiel bierfarejaj laboristoj, aŭ kontraŭe: kiel frizistoj, kiel dorlotataj filetoj; tri groŝojn oni por ili ne pagus, kaj tamen tiu-ĉi kaj la alia el ili havis en la animo ian ekzaltecon, ian nekutiman form-kaj kolorsenton, kaj la forton eligi tiun senton el si sur la tolon. Ostŝinski, kiu havas por ĉio ĝenerale akceptitan esprimon, skribus, parolante pri tio en sia „Fluganto“: „spiritus flat ubi vult!“

Laŭ opinio de Svjatecki, la historia pentrado estas „obskura barbareco“. Mi ne pentras historiajn temojn kaj por mi persone tio estas indiferenta, sed mi aŭdas tiun kvazaŭ-progreseman opinion ĉiuflanke. Oni faris el tio aksiomon kaj ĝi jam komencas min enuigi.

Niaj polaj pentristoj faras unu eraron. Ili tuj edziĝas kun iuj doktrinoj pri arto, kaj poste vivas sub ilia pantoflo, rigardas ĉion per iliaj okuloj, adaptas al ili la arton kaj pli bone apostolas, ol pentras. Kontraŭe al tio, kion mi diris supre, mi konis tiajn pentristojn, kiuj senĉese parolis pri tio, kio estas arto, kaj kia ĝi devas esti, sed kiam ili fine prenis en manon la penikon, ili scipovis nenion...

Ofte mi pensis pri tio, ke la teorion de arto devas formi filozofoj — kaj se ili kreos malbonan teorion — ili estu prirespondaj; sed pentristoj devas pentri tion, kion diktas al ili la koro — kaj scipovi pentri, ĉar tio estas la plej grava...

Laŭ mia opinio la plej mizera talento valoras pli, ol la plej grandioza teorio, kaj la plej grandioza teorio ne indas ciri la botojn al libereco.

---

## X.

Mi vizitis kun Kazja kaj gesinjoroj Suslovski la ekspozicion.

Antaŭ mia bildo staras ĉiam aregoj da rigardantoj.

Oni komencis flustri, tuj kiam ni eniris, kaj tiun-ĉi fojon oni rigardis plej multe ne la bildon, nek min, sed Kazja'n. Precipe la virinoj ne turnis de ŝi la okulojn. Mi vidis, ke ŝi estis pro tio treege kontenta, sed mi ŝin pro tio ne kulpigas...

Pli malbone estis, ke pri la kadavruloj de Svjatecki ŝi diris, ke tiu-ĉi bildo estas „maldeca“. Suslovski deklaris, ke ŝi esprimis tion, kion li estis dironta, sed mi estis furioza. Bedaŭrinde estas, ke Kazja rigardas el tia vidpunkto la arton!

Kolerigite mi adiaŭis ilin tuj, kaj, sub preteksto, ke mi devas viziti Ostŝinski'n, mi efektive iris al Ostŝinski, sed pro tio, por kunpreni lin en restaŭracion kaj matenmanĝi.

---

## XI.

Mi vidis veran mirindajon!

Nur nun mi komprenas, kial homo havas okulojn.

Corpo di Baccho! Kia beleco!

Ni iras kun Ostŝinski. Subite mi vidas, ĉe angulo de strato Vjejbova, preterpasas nin virino. Mi estas fulme-trafita, fiksita al tero, mi ŝtoniĝas, malfermas okulojn, perdas konscion, kaptas senscie Ostŝinski'n je la kravato, malligas al Ostŝinski la kravaton — kaj — savu, mi pereas!

Nenion signifas, ke ŝi havas perfektajn trajtojn... Nenio grava la trajtoj! — sed tio estas vere artista koncepto! ĉefverko kiel desegno, ĉefverko kiel kolor-eco, ĉefverko kiel sento. Greuze reviviĝus ĉe ŝia vido, kaj poste pendigus sin malespere, ke li pentris tiajn birdo-timigilojn.

Mi rigardas, rigardas... Ŝi iras sola — tute ne! Kun ŝi iras poezio, iras muziko, iras printempo, iras volupto kaj amado. Mi ne scias, ĉu mi volus pentri ŝin tuj, ĉar mi preferus genufleksi antaŭ ŝi, kaj kisi ŝiajn piedojn, danke por tio, ke ŝi venis tia en la mondon. Cetere ĉu mi scias, kion mi volus!...

Ŝi preterpasas nin tiel serena kiel somera tago. Ostŝinski salutas ŝin, sed ŝi ne vidas lin... Mi vekigas el raviteco kaj mi krias:

— Ni sekvu ŝin!

— Ne, diras Ostŝinski, ĉu vi freneziĝis? Mi devas kunligi mian kravaton! Lasu min trankvile! Ŝi estas mia konatino.

— Via konatino? prezentu min!

— Tio ne okazos... gardu vian fianĉinon.

Mi ekmalbenas Ostŝinski'n kaj lian posteularon ĝis la naŭa generacio, poste mi volas mem postkuri la nekonatinon.

Malfeliĉe ŝi sidiĝis en fiakron.

De malproksime mi vidas nur ŝian rizopajlan ĉapelon kaj la ruĝan sunombreton.

— Ĉu vi konas ŝin vere? mi demandas Ostŝinski'n.

— Mi konas ĉiujn.

— Kiu ŝi estas?

SinJORINO Helena Kolĉanovska, naskita Turno, alie, tiel nomata virga vidvino.

— Kial virga vidvino?

— Ĉar ŝia edzo mortis ĉe la t. n. sukeraĵa vespermanĝo. Se vi jam kvietiĝis, mi al vi rakontos ŝian historion.

Estis tre riĉa, seninfana fraŭlo Kolĉanovski de Kolĉanovo, nobelo el Ukraino. Li havis treege estimandan familion, kiu esperis heredi post lia morto — kaj li havis treege mallongan kolon, kiu pligrandigis ankoraŭ la fidon de la heredontoj. La heredontojn mi ne konis. Ili estis esence tute decaj homoj, sed kion vi volas! la plej decaj, la malplej profitemaj el ili ne povis deteni sin, por ne rigardi de tempo al

tempo la kolon de Kolčanovski. Tio fine tiel tedis la maljunulon, ke, spite al la familio, li faris amari deklaron al filino de najbaro, faris edziĝan kontrakton, testamentis al ŝi la tutan sian posedaĵon, poste edziĝis; post la edziĝa soleno estis edziĝa festeno, ĉe ĝia fino la tiel nomata sukeraĵa vespermanĝo, kaj ĉe la fino de la sukeraĵa vespermanĝo la apopleksio mortigis lin ĉi-loke... Tiamaniere sinjorino Helena restis virga vidvino — vi komprenas?

— Antaŭ kiom da tempo tio okazis?

Antaŭ tri jaroj. Ŝi estis tiam dudekdu-jara... De post tiu tempo ŝi povis edziniĝi dudekdu-foje, sed ŝi ne volas... Oni supozis, ke ŝi atendas princon. Montriĝis, ke ankaŭ ne, ĉar antaŭ nelonge ŝi rifuzis princon. Cetere mi scias bone, ke ŝi ne estas pretendema, kion pruvas plej bone la cirkonstanco, ke sinjorino Kolčanovska vivas ĝis nun en intima amikeco kun nia konatino, la simpatia, talenta k. t. p. Eva Adami, kies lerneja koleĝino ŝi estis iam en la edukejo.

Aŭdinte tion, mi supren-saltis pro ĝojo.

Se la afero estas tia, mi ne bezonas Ostŝinski'n. Mia amata, honesta Eveto faciligos al mi la interkoniĝon kun Helena Kolčanovska.

— Aŭskultu, do vi ne enkondukos min al ŝi? — mi demandas Ostŝinski'n.

— Cetere, se iu volas en la urbo interkoniĝi kun iu alia, li interkoniĝos — respondas Ostŝinski — sed ĉar vi min forigis de Kazja, do mi ne volas, ke ĉi-tiufoje oni diru, ke mi kunagis... Fine, ĉu mi scias?... Adiaŭ!



## XII.

Tiun-ĉi tagon mi estis petita tagmanĝi ĉe Sulsovski'j, sed mi skribis al ili, ke mi ne venos...

Kvankam la dentoj ne doloris min iam en la vivo, sed ili povis ja ekdolori.

Helena staris dum la tuta tago antaŭ miaj okuloj, ĉar cetere, ĉu tiu estus pentristo, kiu ne meditus pri tia vizaĝo?

Mi pentris en la animo jam ĉirkaŭ dekon da ŝiaj portretoj. Mi ekpensis ankaŭ pri pentraĵo, en kiu la vizaĝo de Hela farus bonegan impreson. Mi bezonas nur vidi ŝin ankoraŭ kelkfoje.

Mi kuris al Evka Adami, sed mi ne trovis ŝin hejme. Hieraŭ mi ricevis karton de Kazja, kun invito, trinki morgaŭ akvon en la ĝardeno kaj poste kafon. Vera turmento estas por mi tiu-ĉi akvo kaj tiu-ĉi kafol!

Mi ne povas iri, ĉar se mi matene ne renkontos Evon hejme, tiam mi ne kaptos ŝin dum la tuta tago...

Eva Adami (tio estas ŝia teatra nomo, efektive ŝi nomiĝas Anna Jedlinska), estas eksterordinara knabino.

Jam longe ligas nin amikeco kaj ni diras al ni reciproke „ĉi“.

Ŝi estas jam la naŭan jaron en la teatro, kaj ŝi restis pura en la plena signifo de tiu-ĉi vorto. Ĉar en teatroj troviĝas certe multe da virinoj, kiuj estas fizike ĉastaj; sed se iliaj korsetoj volus iam perfidi ĉiujn volupto-dezirojn de siaj sinjorinoj, mi supozas, ke la plej senhonta paviano povus rugiĝi en ĉiuj neharkovritaj lokoj de sia korpo. La teatro demoralizas la animojn, precipe de virinoj.

Oni eĉ ne povas postuli, ke virino, kiu ĉiuvespere ludas amon, fidelecon, noblecon k. t. p., ne eksentu fine instinkte, ke ĉiuj-ĉi virtoj estas scenejaĵoj, apartenantaj al la drama kaj aktora arto, sed ne havantaj ian rilaton kun la vivo.

La grandega diferenco inter la arto kaj la realeco de vivo konfirmas en ili tiun-ĉi senton; la rivalizado kaj envio pri aplaŭdoj venenas la pli noblajn kor-aspirojn.

La konstanta komunikiĝo kun homoj tiel demoralizitaj, kiel la aktoroj, vekas en ili la voluptemon. Ne ekzistas tiel blanka angora-kato, kiu ne malpurigus en tiaj kondiĉoj. Venki ilin povas nur grandega talento, kiu puriĝas en la fajro de arto, aŭ naturo tiel esence estetika, ke la malbono ne trasorbiĝas tra ĝi, kiel akvo ne penetras la plumojn de cignoj. Al tiaj naturoj impermeable apartenas Eva Adami.

Dum noktoj, ĉe teo kaj pipo, mi ofte diskutis kun kolegoj pri homoj, apartenantaj al la mondo de arto, komencante de la plej supera kategorio, kiun prezentas la poetoj, kaj finante per la plej malsupera kategorio, t. e. la aktoroj.

Estajo, kiu havas imagecon pli disvolvitan ol kutima mortemulo, estajo pli ol aliaj impresebla, sentama, malkvieta, — estajo, kiu en sfero de feliĉo kaj volupto scias ĉion kaj avidas ĝin nerezisteble forte— jen estas la artisto.

Li devas havi trifoje pli da karaktero kaj volo, ol aliaj homoj, por forpuŝi la tentojn.

Tamen, kiel ne ekzistas motivo, kial floro, pli bela ol aliaj, devus esti pro tio pli rezista kontraŭ ventego, same ne ekzistas motivo, kial artisto devus havi pli da karaktero ol homo ordinara.

Kontraŭe, ekzistas kaŭzo, pro kiu li kutime havas malpli, ĉar lia vivoforto pereas en tiu abismo kaj la malpaco, kiuj apartigas la art-mondon de la mondo de ĉiutaga realo.

Li simple estas malsana birdo, konsumata konstante de febro, birdo, kiu iafoje malaperas sub la nuboj, iafoje trenas la lacajnflugilojn en polvo kaj koto. La arto donas al li la abomenon kontraŭ polvo kaj koto, sed la vivo forprenas de li la forton necesan al suprenflugo. Tio estas ofte la kaŭzo de la malkonsento inter la ekstera kaj interna vivo de artistoj.

La mondo, kiu postulas de ili pli ol de aliaj, kaj kiu ilin kondamnas, eble estas prava, sed ankaŭ Kristo estos prava, kiam li savos ilin...

Ostŝinski asertas, ke la aktoroj tiome apartenas al la artista mondo, kiome apartenas al ĝi trombonoj, klarnetoj, ĉaskornoj k. t. p., sed tio ne estas vera.

Plej bonan pruvon prezentas Eva Adami, kiu estas trae artistino, per sia talento kaj la arto-sento, kiu gardis ŝin de malbono, kiel patrino...

### XIII.

Malgraŭ mia tuta amikeco al Eva, mi ne vidis ŝin jam de longe; do ekvidinte min, ŝi tre ĝojis, kvankam ŝi havis ian strangan mienon, kiun mi ne povis ĝuste kompreni.

— Kiel vi fartas, Vladjo, — ŝi diris — mi vin ja vidas.

Mi estis kontenta, ke mi ŝin trovis hejme.

Ŝi estis vestita en turkan matenrobon kun ruĝaj makuloj sur kremkolora fono, kun larĝa vieil or borderaĵo kaj distranĉitaj manikoj. Precipe la borderaĵo kontrastis belege kun ŝia pala haŭtkoloro kaj la violkoloraj okuloj. Tion mi diris al ŝi, kaj ŝi estis tre kontenta, do mi tuj komencis paroli pri la afero.

— Mia ora diva! mi diras, ci konas sinjorinon Kolĉanovska, la mirindan ukrainaninon?

— Mi konas, ŝi estas mia koleginino.

— Konduku min al ŝi...

Eva komencas balanci la kapeton.

— Mia ora, mia bona, se ci min ŝatas!

— Ne Vladjo! mi cin ne kondukos.

— Rigardu, kiel vi estas malbona, kaj mi foje preskaŭ ekamis vin!

Kia mimozo estas Eva!

Aŭdintè tion, ŝi ruĝetiĝas, apogas la kubutojn sur la tablo (mirinde belaj estas tiuj kubutoj), ŝi metas la manojn sur sian palan vizaĝon kaj demandas:

— Kiam tio-ĉi okazis?

Urĝas min paroli pri Hela, sed ĉar efektive mi preskaŭ foje enamiĝis je Eva, kaj ĉar nun mi volas ŝin bonhumorigi, do mi komencas rakonti.

— Estis tiel... Ni iris foje post la teatra prezentado en la botanikan ĝardenon. Vi memoras, kiel mirinde bela estis la nokto! Ni sidis sur benketo apud la baseno — vi diris, ke vi volas aŭskulti la najtingalon. Mi estis iom malgaja, mi deprenis la ĉapelon, ĉar mia kapo doloris, kaj vi iris al la baseno, trempis la poŝ-tukon en akvon kaj metis ĝin kune kun via mano sur mian frunton. Vi ŝajnis al mi esti tiam tiel bona kiel anĝelo kaj mi ekpensis: se mi prenos tiun-ĉi manon kaj metos sur ĝin la buŝon — tiam ĉio estos perdita! tiam mi enamiĝos en vin ĝismorte...

— Kaj plu? demandas Eva mallaŭte.

— Subite vi tiel rapide formoviĝis, kvazaŭ vi ion divenus.

Eva sidas dum kelka tempo enpenŝiĝante, poste ŝi vekigiĝas el tiu meditado kaj diras nerve-rapide:

— Ne parolu ni pri tio, mi petas...

— Bone, ni ne parolu pri tio... Vi scias, Eva, mi ŝatas vin tro, por povi iam enamiĝi en vin. Unu afero esceptas la alian. De la tempo, kiam mi vin ekkonis, mi havas por vi veran kaj sinceran sindonemon.

— Sed jen! — diras Eva, — kvazaŭ sekvante la vojon de propraj pensoj, ĉu estas vere, ke vi fianĉiĝis?

— Vere.

— Kial vi ne diris al mi tion?

— Ĉar tio disiĝis kaj reboniĝis antaŭ mallonga tempo! Sed, se vi intencas diri al mi, ke kiel fianĉo mi ne devas interkoniĝi kun Sinjorino Hela, mi respondas al vi antaŭe: mi estis pli frue pentristo ol fianĉo. Vi ne timas ja pri ŝi?

— Ne imagu tion al vi. Mi ne kondukos vin al ŝi, ĉar mi ne volas, ke la malbonaj langoj ŝin kalomniu. Oni diras, ke de kelke da semajnoj la duono da Varsovio enamiĝis en vin; oni rakontas ne kredeblajn aferojn pri viaj sukcesoj. Nur hieraŭ mi aŭdis spritajon, ke el la dek diaj ordonoj vi faris por vi unu solan — vi scias kian?

— Kian?

— „Vi ne deziru edzinon de via proksimulo... vane...”

— Dio, vi vidas mian mizeron! sed la spritaĵo estas bona.

— Kaj certe trafa?

— Aŭskultu, Eveto, ĉu vi deziras scii la tutan veraĵon? Mi estis ĉiam timema, mallerta, mi ne havis kaj ne havas sukceson ĉe virinoj. La homoj imagas al si multegon, kaj dume vi eĉ ne konjektas, kiom da vero estis en la ekkrio: Dio, vi vidas mian mizeron!

— Povero maĉstro!

— Lasu la italaĵon... ĉu vi enkondukos min al sinjorino Kolĉanovska?

— Mia Vladeto, mi ne povas... ju pli ĝenerale

vi estas opiniata Don-Huano, des malpli konvenas, ke mi, aktorino, enkonduku vin al virino sol-estanta kaj tiel turnanta sur sin ĉies atenton, kiel Hela.

— Kial do vi akceptas min?

Koncerne al mi, la afero estas tute alia! Mi estas aktorino kaj mi povas apliki al mi la vortojn de Ŝekspir: „Se vi estus eĉ pli pura ol larmo, pli blanka ol neĝo, vi ne evitos la kalumnion“.

— Vere, oni povas freneziĝi. Do ĉiu povas ŝin koni, povas ŝin viziti, povas ŝin rigardi, nur mi ne povas! Kaj kial? Ĉar mi pentris bonan bildon kaj akiris ian famon.

— El via vidpunkto vi estas prava, — diras Eva ridetante. Vi eĉ ne supozas, ke mi antaŭe sciis, pro kio vi min vizitis. Estis tie-ĉi Ostŝinski kaj persvadis min, ke mi faros „pli bone“, se mi ne enkondukos vin al Hela.

— Ha, mi komprenas! kaj vi promesis al li?

— Mi ne promesis, eĉ mi koleriĝis... Mi tamen opinias, ke „pli bone“ estos ne enkonduki vin. Ni parolu nun pri via pentraĵo!

— Lasu min trankvile kaj ne parolu pri la pentraĵo kaj la pentrarto. Sed, se vi ne konsentas enkonduki min, do bone! Jen mi antaŭanoncas al vi, ke en la daŭro de tri tagoj mi interkoniĝos kun sinjorino Kolĉanovska, eĉ se mi devus iri al ŝi en alivestiĝo.

— Alivestu vin kiel ĝardenisto kaj alportu al ŝi bukedon — de Ostŝinski.

Sed mi ekpensas en tiu-ĉi momento pri nova koncepto, kiu ŝajnas al mi esti tiel bonega, ke mi ekbatas per mano mian frunton, ke mi forgesas la

koleron, la ofendeton, kiun mi antaŭ momento sentis kontraŭ Eva, kaj ke mi ekkrias:

— Donu vian vorton, ke vi min ne perfidos!

Mi donas! — diras Eva sciemigite.

— Eksciu do, ke mi alivestiĝos kiel ukraina did\*)-liristo. La tutan kostumon kaj la liron mi havas, en Ukraino mi estis multfoje, la ukrainajn kantojn mi scipovas kanti... Sinjorino Kolĉanovska estas ukrainanino, sekve ŝi min akceptos certe, — vi komprenas nun?...

— Kiel originala koncepto! — diras Eva.

Sed ŝi estas tro artistino, por ke mia ideo al ŝi ne plaĉu; cetere, ŝi donis la vorton, ke ŝi ne perfidos — kaj ŝi nenion riproĉas.

— Kiel originala koncepto! — ŝi ripetas. Hela tiel amas sian Ukrainon, ke ŝi kredeble ekploros pro kortuŝo, kiam ŝi tie-ĉi, en Varsovio, ekvidos liriston... Sed kion vi diros al ŝi? Kiel vi klarigos al ŝi, kiamaniere ŝi troviĝis tie-ĉi, apud Vistulo?

Malgraŭvole mia entuziasmo komunikiĝas al Eva.

Post kelka tempo ni sidiĝas kaj komencas komploti...

Ni interkonsentiĝas, ke mi karakterizos min kiel liristo, kaj Eva alveturos al mi kaj kunprenos min en la kaleŝon, por ke mi ne tro altiru la sciemon de gampemuloj; sinjorino Helena devas scii pri nenio, antaŭ ol Eva, post kelka tempo, perfidos la sekreton.

Ambaŭ kun Eva ni amuzas nin bonege per nia projekto, poste mi komencas kisi ŝiajn manojn, poste ŝi retenas min al matenmanĝo.

---

\*) maljunulo, almozulo.



La vesperon mi pasigas ĉe Suslovski'j.

Kazja estas iom malserena, ke mi ne venis matene, kaj mi toleras tute trankvile ŝian malbonhumoreton, kaj pensas dume pri la morgaŭa militiro kaj... pri Hela.

---

#### XIV.

Dekunua horo matene...

Eva venos tuj, tuj.

Mi surhavas stup-tolan ĉemizon, malfermitan sur la brusto, vilaĝanan surtuton iom difektitan, sed ankoraŭ sufiĉe bonan, krom tio: zonon, botojn, ĉion, kio estas bezona.

La haroj de la griza peruko malsupren-pendas sur miaj okuloj, kaj oni devus esti sagaculo, por ekoni, ke tio estas peruko; mia barbo estas ĉefverko de pacienco. Komencante de la oka horo matene mi engluadis per koncentrita iŝtiokolo blankajn harfadenojn inter miaj propraj haroj — kaj mi griziĝis tiel, ke eĉ en mia maljuneco mi ne griziĝos pli nature... Diluita sepio donis al mi la brunetan haŭtkoloron, kaj la sulketojn faris Svjatecki vere genie. Mi aspektas sepdekjara.

Svjatecki asertas, ke, anstataŭ pentri, mi povus perlabori la panon kiel modelo, kio estus eĉ pli profitodona por la arto.

Estas duono de la dekdua horo... Eva alverturas. Mi sendas paketon kun mia ordinara vestaĵo en

la kaleŝon, ĉar mi ne scias, ĉu eble mi ne devos alivestiĝi; poste mi prenas la liron, malsupreniras, kaj ĉe la kaleŝpordeto mi ekkrias:

— Slava Bohu!\*)

Adami estas mirigita kaj ravita.

— Mirinda abelejgardisto! Mirinda did! — ŝi ripetas ridante. Nur artisto povas elpensi ion similan!

Paranteze parolante, ŝi mem aspektas kiel somera printempo. Ŝi surhavas robeton el kruda silk-ajo kaj pajlan ĉapelon kun papavo-floroj. Mi ne povas satiĝi rigardante ŝin. Ŝi alveturis en malkovrita kaleŝo, do la homoj tuj komencas nin ĉirkaŭi; sed tio estas por ŝi indiferenta.

Fine la kaleŝo moviĝas antaŭen; mia koro komencas bati pli vive — post kvaronhoro mi vidos la revitan Helenon...

Ni ankoraŭ ne veturis cent paŝojn, kiam mi de malproksime ekvidas renkonten-irantan Ostŝinski.

Li devas ĉie troviĝi!

Ekvidinte nin, li haltas, salutas Eveton, poste li komencas atente observi nin ambaŭ, kaj speciale min... Mi ne supozas, ke li min rekonis, tamen preterpasinte lin, mi ekrigardas malantaŭen kaj vidas, ke li ankoraŭ staras kaj akompanas nin per sia rigardo. Nur ĉe la strat-turniĝo li malaperas el niaj okuloj. La kaleŝo antaŭen-moviĝas sufiĉe rapide; malgraŭ tio, ŝajnas al mi, ke la vojaĝo daŭras eterne. Fine, en la Belvederaj aleoj ni haltas...

Ni estas antaŭ la domo de Hela.

Mi kuras al la pordo, kvazaŭ al brulejo.

---

\*) Gloron al Dio! ukraina saluto.

Eva kuras malantaŭ mi, vokante:

— Netolerebla maljunulo!

Servisto, kun tre parada staturo, malfermas al ni la pordon, kaj apertas larĝe la okulojn je mia vido; Eva kvietigas lian miriĝon, dirante, ke la maljunulo alveturis kun ŝi, kaj ni supreniras.

La ĉambristino aperas momente, sciigas ke la sinjorino vestas sin en la apuda ĉambro — kaj ŝi malaperas.

— Bonan tagon, Hela! vokas Eva.

— Bon-tagon, Eva! — respondas mirinde bela, freŝa voĉo — tuj, tuj! post momento mi estos preta.

— Henjo! Vi eĉ ne supozas, kia surprizo vin atendas kaj kiun vi ekvidos... Mi alveturigis „did'on“, plej efektivan „did'on-liriston“, kiu iam ajn migris sur la ukrainaj stepoj.

Ĝojega pepo aŭdiĝas en la apudkuŝanta ĉambro, la pordo malfermiĝas subite kaj enkuras Hela nevestita, en korseto, kun malligitaj haroj.

— Did! blinda did! tie-ĉi! en Varsovio!

— Li ne estas blinda! li vidas! — vokas rapide Eva, ne volante troigi la ŝercon.

Sed estas jam tro malfrue, ĉar en tiu-ĉi momento mi ĵetiĝas al la piedoj de Hela kun ekkrio:

— Ĥeruvime boĵij!\*)

Kaj ĉirkaŭprenante per manoj ŝiajn piedojn, kaj samtempe levante la okulojn, mi ekvidas iom pluan formon de tiuj piedetoj. Nacioj genufleksu! popoloj venu kun bonodoraj incensiloj, Milosa! tute Milosa!\*\*)

— Ĥeruvime! mi ripetas en nesimulita ekstazo!

---

\*) Kerubo dia!    \*\*) Venus el Milos.

Mia did'a entuziasmo klariĝas cetere per tio, ke post longa migrado mi renkontis la unuan ukrainan animon. Malgraŭ tio Hela forigas la piedojn el miaj manoj kaj ekpaŝas malantaŭen... Unu momenton mi vidas ankoraŭ ŝiajn nudajn ŝultrojn kaj la kolon, kiuj rememorigas al mi Psiĥe-on el la neapola muzeo — poste ŝi malaperas malantaŭ la pordo, kaj mi restas genuante en la mezo de l' ĉambro.

Eva samtempe minacas al mi per sia sunombrelo kaj ridas, kaŝante sian rozkoloran nazeton en la bukedo da rezedo.

Dume tra la pordo komenciĝas interparolo en la plej bela dialekto, kiu iam ajn estis parolata de la enfluejo de Pripec-rivero ĝis Ĉertomeliko.

Mi prepariĝis antaŭe por ĉiuj eblaj demandoj, do mi mensogas sen ekbalbuto... Mi estas „abelej-gardisto“ el proksime de Ĉeĥrin. Mia filino sekvis sian polan edzon en Varsovion, kaj mi, maljunulo, tiel longe sopiris en la abelejo, ĝis mi mem postmigris ŝin. Bonaj homoj donis envoje monerojn por mia kantado... Kaj nun? Jen mi ekvidos la infaninon amatan, benos ŝin, kaj revenos, ĉar mi jam sopiras al mia Ukraino-patrino. Ĉiu devas morti, kaj por la maljuna Filipino estas de longe jam la tempo.

Jen kio estas aktora naturo! Enjo scias ja, kiu mi estas, sed ŝi tiel partoprenas en mia rolo, ke ŝi komencas melanĥolie balanci sian belegan kapeton kaj rigardi min kunsente. La voĉo de Helenjo el la apuda ĉambro ankaŭ tremas emocie.

La pordo iomete malfermiĝas, blanka mirinda brako montriĝas tra la malfermaĵo kaj mi surprize ricevas tri rublojn, kiujn mi akceptas, ne povante agi

alie, kaj des pli, en nomo de ĉiuj sanktuloj, mi flui-  
gas torenton da benoj sur la kapon de Helenjo.

Interrompas min la servistino, kiu eniras kun  
sciigo, ke sinjoro Ostŝinski estas malsupre kaj de-  
mandas, ĉu la sinjorino akceptas.

— Ne enlasu lin! mia kara — vokas timigite Eva.

Hela deklaras, ke ŝi kompreneble ne akceptos  
lin. Ŝi eĉ esprimas sian miron pro la matena vizito.  
Mi, vere, ankaŭ ne komprenas, kiel Ostŝinski, kiu fan-  
faronas kaj estas fama pro sia kono de societa etiketo,  
povis veni je tiu tempo.

— Tio ne estas senmotiva! — diras Eva.

Sed ni ne havas tempon por pluaj klarigoj, ĉar  
en tiu-ĉi momento aperas Hela jam vestita, kaj sam-  
tempe oni sciigas, ke la matenmanĝo estas preta.

Ambaŭ sinjorinoj transiras en la manĝejon.

Hela volas min nepre sidigi apud la tablo, sed  
mi obstinas kaj sidiĝas kun mia liro ĉe la sojlo. Post  
momento mi ricevas pladon, tiel plensarĝitan per manĝ-  
aĵo, ke, konsuminte ĉion-ĉi, ses ukrainaj almozuloj  
povus malsaniĝi je nedigestebleco. Mi tamen man-  
ĝas, ĉar mi estas malsata kaj dum manĝado mi ob-  
servas Helenon.

Efektive, pli bela kapo ekzistas en neniu bildogalerio de l' mondo! Kiel longe mi vivas, neniam mi vidis tiel travideblajn okulojn: vere oni vidas tra ili ĉiujn pensojn, kiel oni vidas la fundon de klara torento. La okuloj posedas krom tio la econ, ke ili komencas ridi antaŭe ol la buŝo, pro kio la vizaĝo lumiĝas, kvazaŭ trafite de sunradio. Kia nekomparebla dolĉeco en la kunmeto de lipoj... La kapo estas iom laŭ speco de Carlo Dolce, kvankam la desegno

de okuloj kaj brovoj rememorigas Sanzio'n en la plej nobla tipo.

Mi ĉesas fine manĝi kaj mi rigardas, rigardas... kaj mi rigardus ĝis fino de l' vivo.

— Vi ne vizitis min hieraŭ — diras Hela al Eva — mi esperis, ke vi venos al mi post tagmezo.

— Matene mi havis teatran provon, kaj post-tagmeze mi volis vidi la bildon de Magorski.

— Vi vidis ĝin?

— Nebone, estis tia interpremo... kaj vi?

— Mi estis matene. Kia poeto! Oni povus plori kune kun tiuj judoj.

Eva rigardas min, kaj mia brusto ĝoje leviĝas.

— Mi iros ankoraŭ, kiomfoje mi povos — diras, ree Hela. Ni iru kune, bone? Eble ankoraŭ hodiaŭ? Tiel plezure estis al mi ne nur rigardi tiun pentraĵon, sed ankaŭ imagi al mi, ke ĉe ni en Polujo troviĝis tia talento.

Ĉu oni povas ne admiri tian virinon!

Subite mi aŭdas plu:

— Bedaŭrinde oni rakontas strangajn aferojn pri tiu Magorski... mi konfesas al vi, ke mi estas treege scivola ekkoni lin.

— Ah! — diras senzorga-tone Eva.

— Vi lin konas? vere?

— Mi povas vin certigi, ke li multe perdas ĉe plua konateco: li estas tromemfida, vanta, ah! kiel li estas vanta!...

Mi tiel volonte montrus al Eva la langon, ke mi apenaŭ povas min reteni, kaj ŝi turnas al mi fripone siajn violkolorajn okulojn kaj diras:

— Vi iel perdis la apetiton, avulo?

— Mi montros la langon — tion mi ne toleros!  
Dume ŝi diras plu al Hela:

— Ho jes! Magorski ĝindas pli admiron ol interkoniĝon. Ostŝinski difinas lin, ke li estas geniulo en korpo de „frizisto“.

De Ostŝinski mi forŝirus la orelojn, se li dirus ion similan; pri Eva mi sciis, ke ŝi havas malican koboldon malantaŭ sia kolumo, sed ŝi efektive transpaŝas la permesitan mezuron.

Feliĉe la tagmanĝo finiĝas.

Ni eliras en la ĝardenon, kie mi devas prezenti mian kantarton.

Tamen tio komencas min iom enuigi kaj mi preferus esti ĉe Hela kiel pentristo, ol kiel did...

Sed nenio helpas kontraŭ tio!

Mi sidiĝas apud la muro en ombro de kaŝtandarboj, tra kies folioj penetras la suno kaj formas sur la grundo multon da helaj makuloj. Tiuj-ĉi makuloj tremas, flagretas, malaperas kaj brilas denove, laŭ tio, kiel la ventbloveto movas la foliojn. La ĝardeno etendiĝas profunde, malproksime de l' strato, do la veturila radbruo preskaŭ tute ne atingas ĝin, des pli ke supersonas ĝin la murmurado de la ĝardena fontano. La varmego estas netolerebla. Inter la densa foliaro aŭdiĝas la ĉirpado de paseroj, sed malforte, kvazaŭ dormeme. Cetere regas mallaŭto.

Mi perceptas, ke formiĝas tute bela bildo: ĝardeno, profundo de arboj, sunaj radioj, fontano; la du virinoj, kun neordinare belaj vizaĝoj, apogiĝas unu sur alia, kaj mi, did, sidas kun liro apud la muro; ĉio ĉi kune havas en si ian ĉarmon, kiun mi sentas kiel pentristo.



Mi preskaŭ forgesas pri mia rolo kaj mi komencas  
kanti emocie la ukrainan popolkanton:

„Homoj nomas min feliĉa!  
Mi pro tio ridas,  
Ĉar kaŝitan mian ploron  
Ili ja ne vidas.

Malfeliĉa de naskiĝo  
Restos mi ĝis morto.  
Kial naskis vi, patrino,  
Min por tia sorto!“

Eva estas kortuŝita, ĉar ŝi estas artistino, Hela —  
kiel ukrainanino, kaj mi — ĉar ambaŭ estas tiel belaj,  
ke ilia aspekto min ebrigas.

Hela aŭskultas sen ia troigo, sen artefarita ra-  
viteco, sed en ŝiaj klaraj okuloj mi vidas, ke la aŭs-  
kultado faras al ŝi veran kaj sinceran plezuron.

Kiel granda diferenco estas inter ŝi kaj tiuj ukrain-  
aninoj, kiuj alveturas Varsovion por la karnavalo, kaj  
dum la kvadrilo turmentas la dancantojn per sia so-  
piro al Ukraino; kaj laŭvere, kiel diras unu el miaj  
konatoj: eĉ per ferhokoj neniu el ili estus eltirebla  
el Varsovio kaj el la karnavalo en sian Ukrainon!

Hela aŭskultas, movas laŭtakte sian belegan ka-  
peton, iufoje ŝi diras al Eva: „tion mi konas“ kaj ŝi  
kantas kune kun mi, kaj mi vere superas min mem.  
Mi eligas el mia memoro kaj brusto la tutan provizon  
da stepa kantmaterialo, komencante de la „hetmanoj,  
kavaliroj kaj kozakoj“ kaj finante per „falkoj, Sonjoj  
Manjoj, stepoj, tombaj montetoj“, kaj tiel plu senfine.  
Mi mem miras, el kie mi ĉion-ĉi prenis.

La tempo pasis kiel sonĝo.

Mi revenis iom laca, sed ravita...

XV.

En la laborejo mi renkontas tute neatendite gesinjorojn Suslovski kaj Kazjon.

Ili volis fari al mi surprizon...

Kial Svjatecki diris al ili, ke kredeble baldaŭ mi revenos?

Nek Kazja, nek ge-Suslovski'j rekonis min... Plej bona pruvo, kiel perfekte mi estis alivestita! Mi proksimaĝas al Kazja, prenas ŝian manon, ŝi foriĝas iom timigite.

— Kazja, vi min ne rekonas? — mi demandas.

Kaj mi ekridas je l' vido de ŝia mirigiteco.

Estas ja Vladek, — diras Svjatecki.

Kazja rigardas min pli precize, fine ŝi komencas ridi, vokante:

— Fi! kiel malbela almozulo!

Mi estas malbela almozulo! Mi estas sciema, kie ŝi vidis pli belan. Sed por la bedaŭrinda Kazja, edukita en estetikaj principoj de paĉjo Suslovski, certe ĉiu almozulo estas malbela.

Mi rifuĝas en nian kuirejton kaj post dekkelke da minutoj mi reaperas en mia natura formo.

Kazja kaj la gepatroj komencas demandi, kion signifas tiu maskiĝo?... Tre simpla afero... Jen, vi vidas, ke ni pentristoj faras iafoje kolegajn servojn unu al la alia, kaj ni pozas por pentraĵoj. Jen ekzemple Svjatecki pozis al mi kiel maljuna judo. Ĉu vi lin ne rekonis, Kazja, en la bildo? Mi nun pozas al Cepkovski. Tia estas la kutimo inter pentristoj, precipe ĉar en Varsovio mankas modeluloj.

— Ni venis por fari al vi surprizon — diras Kazja — des pli, ĉar mi en mia tuta vivo ankoraŭ neniam estis en pentrista laborejo. Ah, kia senordo! Ĉu same estas ĉe ĉiuj pentristoj?

— Pli-malpli, pli-malpli!

Sinjoro Suslovski deklaras, ke li preferus trovi ĉe mi iom pli da ordo, kaj li esperas ĉi-rilate ŝanĝojn en la estonteco. Aŭdante tion, mi volonte disrompus je lia kapo mian liron. Kazja, kontraŭe, ridetas kokete kaj diras:

— Estas iu sinjoro pentristo — granda sentaŭgulo! ĉe kiu ĉio aspektos alie, kiam mi komencos mastrumi... ĉio estos orde metita, orde starigita, senpolvigita...

Tion dirante, ŝi levas supren sian pintan nazeton, rigardas la festonojn de araneaĵo, kiuj ornamas la angulojn de nia laborejo — kaj ŝi aldonas:

— Ĉar tia senordo povas eĉ fortimigi la aĉetantojn... Venas iu kaj li tuj troviĝas kiel en vendejo de malnova fuŝaĵo. Jen, ekzemple tiu-ĉi kiraso terure rustiĝis. Do oni devas alvoki la servistinon, pistigi iom da briko — kaj ĉio komencos brili kiel nova samovaro.

— Jezu-Maria! Ŝi parolas pri aĉetantoj kaj volas

purigi per briko miajn kirasojn, eligitajn el antikvaj tombomontetoj... Ah, Kazja, Kazjal

Suslovski, feliĉigite, kisas ŝian frunton, kaj Svjatecki eligas el si iajn malbonaŭgurajn sonojn, kiuj rememorigas la gruntadon de apro.

Kazja minacas al mi, frapante per fingreto sian nazon, kaj diras plu:

— Mi petas bone memori, ke ĉio aliĝos.

Poste ŝi finas:

— Kaj se iu sinjoro ne vizitos nin hodiaŭ vespere, li estos malbela kaj oni lin ne amos.

Dirinte tion, ŝi kovras la okulojn. Mi ne povas nei, ke estas multe da ĉarmo en ŝiaj grimacaj miĉetoj... Mi promesas, ke mi venos, kaj mi akompanas mian estontan familion ĝis tute malsupre.

Reveninte, mi trovas, kiel Svjatecki rigardas de flanko kaj senfide tutan paketon da centrublaj bankbiletoj, kuŝantaj sur la tablo.

— Kio estas?

— Ĉu vi scias, kio okazis?

— Mi ne scias...

— Mi ŝtelis ĉe iu, kiel ordinara ŝtelisto.

— Kiamaniere?

— Mi vendis miajn kadavrulojn.

— Kaj tio estas la ricevita mono?

— Jes... mi estas malnobla uzuristo.

Mi ĉirkaŭbrakas Svjateckion, gratulas lin tutkore, kaj li komencas rakonti, kiel tio okazis.

— Mi sidis tie-ĉi post via foriro, kiam venis al mi iu sinjoro kaj demandis, ĉu mi estas Svjatecki. Mi respondas: „Mi scivolas, kial mi ne devus esti Svjatecki!“ Tiam li respondas: „Mi vidis vian pentr-

aĵon kaj mi volas ĝin aĉeti.“ Mi diras: „Bone, sed permesu, sinjoro, diri al vi, ke oni devas esti idioto por aĉeti tian hontinde malbonan bildon.“ Kaj li respondas: „Idioto — mi ne estas, sed mi havas la fantazion aĉeti bildojn pentritajn de idiotoj.“ „Nu, bone“ — mi diras... Li demandas min pri la prezo, kaj mi diras: „Ĉu tio estas mia afero?“ „Mi donos al vi tiom.“ „Do bone! se vi donas, do donu!“ Li donis kaj foriris. Li lasis al mi karteton kun nomo Bjal-kovski, doktoro de medicino... Mi estas malnobla, senhonta uzuristo!

— Vivu la kadavruloj! Svjatecki, vi edziĝu...

— Mi preferus pendigi min — diras Svjatecki — mi estas malnobla uzuristo, nenio pli.

---

## XVI.

Vespere mi estas ĉe Suslovski'j.

Ni lokis nin ambaŭ kun Kazja en la saloneto, en la niĉo, kie staras kanapeto.

Sinjorino Suslovskas sidas apud tablo, lumigata per lampo, kaj kudras ion por la dotprovizo de Kazja, sinjoro Suslovski legas grave, apud la sama tablo, numeron de la „Fluganto“.

Mi fartas iomete nebone — mi deziras distri tiun-ĉi malbonan humoron, alŝoviĝante tre proksime al Kazja.

En la saloneto regas silento; interrompas ĝin nur la flustro de Kazja, kiun mi provas ĉirkaŭpreni, kaj kiu respondas:

— Vladjo, paĉjo ekvidos.

Subite la „paĉjo“ ekparolas, komencante legi: „La pentraĵon de la konata artisto Svjatecki, s. t. „La lasta renkonto“ aĉetis hodiaŭ doktoro Bjalovski por 1500 rubloj.“

— Jes, mi diras, Svjatecki vendis ĝin hodiaŭ matene.

Ĉe tio mi penas ree ĉirkaŭpreni Kazjon kaj ree mi aŭdas la flustron:

— Paĉjo ekvidos...

Malgraŭvole miaj okuloj turniĝas al sinjoro Suslovski.

Subite mi vidas, ke lia vizaĝo kolorŝanĝas; li kovras la okulojn per mano kaj kliniĝas super la „Fluganto“.

Kion, je koboldo, li estas tie trovinta?

— Patro, kio okazis al vi — demandas sinjorino Suslovska.

Li stariĝas, faras du paŝojn proksimiĝante al mi, poste li haltas, traigas min per sia rigardo, interplektas la manojn kaj komencas balanci la kapon.

— Kio okazis al vi?

— Jen kiel falseco kaj krimo ĉiam fine malkovriĝas, respondas patose Suslovski: mia sinjoro, legu, se la honto permesos al vi legi ĝis fino.

Tion dirinte, li faras movon, kvazaŭ li involvus sin en roman togon, kaj li transdonas al mi la „Fluganton“. Mi prenas la numeron kaj mia rigardo falas sur la sciigon titolitan: „Ukraina liristo“. Mi konfuziĝas iom kaj komencas rapide legi la jenon:

„Antaŭ kelke da tagoj alvenis en nian ĉefurbon malofta gasto en persono de aĝokaduka liristo, kiu rondiras loĝantajn ĉe ni ukrainajn familiojn, petante pri almozo kaj donante interŝanĝe siajn kantojn. Oni diras, ke pri la maljuna bardo okupiĝis precipe nia konata kaj simpatia artistino E. A., kun kiu, antaŭ ne pli longe, ol hodiaŭ matene, oni vidis lin en kaleŝo. En la unuaj tagoj de l' apero de tiu malproksima gasto naskiĝis la stranga famo, ke sub la vilaĝana

kitelo de la lirsto kaŝiĝas unu el niaj plej eminentaj pentr-artistoj, kiu tiamaniere, ne turnante sur sin la atenton de edzoj kaj zorgantoj, trovas facile eniron en la buduarojn. Ni estas certaj, ke tiu-ĉi famo estas neniel argumentita, eĉ pro tiu simpla motivo, ke nia diva ne konsentiĝus plifaciligi tiaspecajn entreprenojn. La maljunulo, laŭ niaj informoj, almigris rekte el Ukraino. Li havas inteligentecon iom malfortigitan, sed perfektan memoron...“

Infero!

Suslovski estas tiel indignigita, ke li ne povas eligi la voĉon, tamen fine li eljetas el si la troaĵon de indigno.

— Kian novan falsajon, kian artifikon vi trovos por pravigi vian konduton? Ĉu ne vin ni vidis hodiaŭ en tiu-ĉi hontinda alivestiĝo? Kiu estas tiu almozulo?

— Mi estas tiu almozulo — mi respondas — sed mi ne komprenas la motivon, kial vi opinias tiun alivestiĝon hontinda.

En tiu-ĉi momento Kazja eltiras el mia mano la „Fluganton“ kaj komencas legi, Suslovski envolvigis ankoraŭ pli hermetike en la togon de sia indigno kaj diras plu:

— Do apenaŭ vi trapaŝis la sojlon de honesta domo, vi jam enportas kun vi la demoralizon; ne estante ankoraŭ la edzo de tiu-ĉi malfeliĉa infano, vi jam perfidas ĝin en kompanio kun virinoj de facilanima karaktero, vi jam tredas piede ĝian kaj nian konfidon, vi jam rompas la ĵure donitan vorton... Kaj por kiu? Por teatra hetero?!

Nun mi koleriĝas ekstreme...



— Mia sinjoro, mi diras, sufiĉe da tiuj banalaj frazoj! Tiu hetero valoras pli ol dek tiaj falsaj morjuĝistoj kiel vi... Vi estas por mi ankoraŭ nenio, kaj sciu, ke vi min enuigas. Vi tedas min jam, kune kun via patoso, via...

Tie-ĉi mankas al mi vortoj, sed cetere mi ilin ne bezonas plu, ĉar Suslovski malfermas subite la veŝton, kvazaŭ li volus diri:

— Ekbatu! ne indulgu — jen mia brusto...

Sed mi tute ne intencas ekbati, mi nur deklaras, ke mi foriras, timante, ke mi ne diru al sinjoro Suslovski ankoraŭ ion pli...

Kaj efektive mi foriras, ne adiaŭante iun...

Freŝa ekblovo iom malvarmigas mian varmegan kapon.

Estas la naŭa horo vespere kaj la nokto tre serena.

Mi bezonas iom promeni, por fine kvietiĝi, do mi iras rapide en la Belvederajn aleojn.

La fenestroj en la villo de Hela estas mallumaj. Evidente ŝi ne estas hejme. Mi mem ne scias, kial tio kaŭzas al mi grandegan malagrablon...

Se mi ekvidus almenaŭ ŝian ombron sur la fenestrovitraĵo, mi kvietiĝus, kaj nun mi koleriĝas denove...

Kion mi faros al tiu Ostŝinski ĉe nia unua renkonto — mi ne scias...

Feliĉe li ne estas homo, kiu foriĝus de respondeco.

Nur, vere dirante, pro kio mi lin ekatakos? La artikolo estas skribita infere lerte. Ostŝinski ja neas, ke la almozulo estas alivestita pentristo, li fariĝas kvazaŭ defendanto de Eva, kaj samtempe li perfidas la tutan sekreton antaŭ Helena, evidente penas kom-

promiti Evon en la opinio de Hela, kaj li venĝas je mi pro Kazja, kaj krom tio li faras min ridinda.

Se li almenaŭ ne estus skribinta, ke mi havas inteligentecon malfortigitan! Fariĝis... En la okuloj de Hela mi estas ridindigita. Ŝi legas ja la „Fluganton“.

Ha! Kia konfuzo kaj kia ĉagreno por Eva! Kiel triumfas nun Ostŝinski! Mi devas nepre ion entrepreni, sed se mi scias kion, mi fariĝu raportisto de la „Fluganto“.

Mi ekpensas interkonsiliĝi kun Eva. Ŝi ludas hodiaŭ... Mi kuros en la teatron kaj ekvidos ŝin post la fino de la teatraĵo.

Estas ankoraŭ tempo...

Post duonhoru mi estas en ŝia vestejo.

Eva baldaŭ finos, dume mi ĉirkaŭrigardas...

Niaj teatroj ne distingiĝas, kiel oni scias, per lukso de la aranĝoj. Kamero kun blankigitaj muroj, du gasflametoj flagretantaj de trablovo, spegulo, lavigejo, kelko da seĝoj, en unu angulo apogsofeto, estanta verŝajne la privata propraĵo de la diva, jen ŝia vestejo... Antaŭ la spegulo estas multo da tualetaj iloj, taso da ne tute eltrinkita nigra kafo, lanugaĵoj kun ruĝigilo kaj blankigilo, kraĵonoj por brovoj, kelkaj paroj da gantoj, konservantaj ankoraŭ la formon de mano, inter ili du artefaritaj harligoj; sur la flanko muro fasko da roboj blankaj, rozkoloraj, malhelaj, pezaj kaj malpezaj; sur la planko staras du korboj, plenaj de diversaj virinaj uzajoj. La ĉambro estas plenigita per odoro de riza pudro. Kia diverskoloro regas ĉie, kiel ĉio estas rapideme disjetita, kiom da koloroj, kiom da rebriloj, kiom da ombro, kiom da lumludo pro ŝanceliĝado de gasflamoj.

Tio estas bildo siaspeca, en tio estas karaktero... Cetere, tie-ĉi estas ja nenio pli, ol en kutima virina tualetejo, kaj tamen ekzistas io, kio kaŭzas, ke tiu-ĉi ĉambro ne faras la impreson de tualetejo, sed de ia tabernaklo; estas ia ĉarmo, sorĉo... Super tiu senordo, diverskoloreco, rapidemo, inter tiuj gratitaj muroj leviĝas la spiro de l' arto.

Aŭdiĝas tondro da aplaŭdoj. Ha! finiĝis... Tra la muroj atingas miajn orelojn la kriegoj: „Adami! Adami!“ Forpasas kvaronhoro kaj tie oni krias ankoraŭ.

Fine enkuras Eva en la figuro de „Teodora“...

Ŝi havas kronon sur la kapo, okulojn malsupre nigritajn, sur la vangoj ruĝecon de surmetita ruĝigilo. Ŝiaj malligitaj haroj malsupren-falas ventege sur la nudigitan kolon kaj la ŝultrojn. Ŝi estas tiel febre incitita kaj konsumita, ke ŝi parolas al mi per apenaŭ aŭdebla flustro: „kiel vi fartas, Vladjo!“ kaj, depreninte rapideme la kronon, ŝi ĵetiĝas en sia reĝina robo sur la apogseĝon. Ŝi videble ne povas ekparoli vorton, ĉar ŝi rigardas min silente, kiel lacigita birdo... Mi sidiĝas apud ŝi, metas la manon sur ŝian kapon kaj pensas pri nenio alia, krom pri ŝi...

Mi vidas en tiuj malsupre nigritaj okuloj la ankoraŭ ne estingiĝintan flamon de ekstazo, mi vidas sur tiu frunto la veran stigmon de l' arto, mi vidas, kiel tiu junulino oferas sur la altaro de la teatra Moloĥo la sanon, la sangon, la vivon, kiel jen mankas spiro ĉi-momente en ŝia brusto kaj ekregas min tia kompto, tia bedaŭro, tia kunsento, ke mi ne scias, kion mi mem devas fari...

Ni sidas tiel kelkan tempon silente; fine Eva

montras per mano numeron de la „Fluganto“, kiu kuŝas sur la tualetoj kaj ŝi flustras:

— Kia malagrablajo, kia malagrablajo!...

Subite ŝi ekploras nerve kaj komencas tremi kiel folio...

Mi scias bone, ke ŝi ploras de laciĝo, ne pro la „Fluganto“, ke tiu artikolo estas bagatelo, pri kiu morgaŭ ĉiuj forgesos, ke la tuta Ostŝinski ne valoras unu larmon de Eva, tamen mia koro kunpremiĝas tiom pli. Mi kaptas ŝiajn manojn kaj kovras ilin per kisoj, karesas ilin, premas al mia brusto. Mia koro komencas bati ĉiam pli forte, okazas kun mi io stranga. Mi genufleksas, mem ne sciante, kion mi faras, apud la genuoj de Eva, nubeto vualas miajn okulojn, subite mi kaptas ŝin, perdinte la konscion, en la brakojn.

— Vladjo! Vladjo, kompatu! — flustras Eva.

Sed mi premas ŝin al la ekscitita brusto; mi scias jam pri nenio, mi furioziĝis! mi kisas ŝian frunt-on, la okulojn, la buŝon kaj scias elparoli nur unu vorton:

— Mi amas vin! mi amas.

Subite la kapeto de Eva kliniĝas malantaŭen, ŝiaj manoj ĉirkaŭplektas febro-arde mian kolon kaj mi aŭdas la flustron:

— Mi vin delonge amas!...

---

## XVII.

Se ekzistas por mi en la mondo estaĵo pli kara ol Eva, tiam mi estas marinita haringo...

Oni diras, ke ni artistoj faras ĉion sub la unua impreso de l' momento, sed tio estas malvera! Ĉar montriĝas, ke mi delonge amis Evon, nur mi estis samtempe tia azeno, ke mi pri tio ne sciis.

Dio sola scias, kion mi sentis, kiam mi, post tiu vespero, akompanis ŝin hejmen. Ni iris, brak'-sub-brako, nenion parolante... Mi nur alpremis ĉiam al mia flanko la brakon de Eva, kaj ŝi la mian. Mi sentis, ke ŝi amas min per ĉiuj siaj fortoj.

Mi akompanis ŝin ankoraŭ supren, kaj, kiam ni troviĝis en ŝia saloneto, ni estis iel embarasitaj, ke ni ne kuraĝis rigardi unu la alian en la okulojn. Nur kiam Eva kovris sian vizaĝon per la manoj, mi forigis ilin delikate kaj mi diris: „Enjo, ci estas mia? ĉu vere?“ Kaj ŝi alpremiĝis karese al mi, dirante:

— Jes! jes!...

Ŝi estis tiel belega, havis okulojn tiel dormemajn kaj samtempe brilantajn, ian dolĉan pezecon en la tuta staturo, ke mi ne povis forŝiriĝi de ŝi.

Laŭvere, ankaŭ ŝi ne povis forŝiriĝi de mi, kva-  
zaŭ ŝi volus rekompenci al si la longan silentadon  
kaj la longe kaŝitan senton.

Mi revenis hejmen malfrue. Svjatecki ankoraŭ  
ne dormis... Li desegnis ĉe lampo sur ligno por iu  
ilustraĵo.

— Tie-ĉi estas letero por vi — li diras, ne lev-  
ante la okulojn de sia laboro.

Mi prenas de l' tablo la leteron kaj tra la ko-  
verto mi sentas ringon. Bone! mi ĝin bezonos mor-  
gaŭ. Mi malfermas la leteron kaj legas la jenon:

„Mi scias, ke la redono de la ringo faros al vi  
plezuron, ĉar evidente vi tion celis. Koncerne min,  
mi ankaŭ ne intencas rivalizi kun aktorinoj. K.“

Almenaŭ mallonge.

El tiu-ĉi letero vidiĝas nur kolero, nenio pli.

Se ia ombro de ĉarmo ĉirkaŭis ankoraŭ Kazjon  
en miaj okuloj, tiu ombro malaperas senrevene.

Stranga afero: ĉiuj supozas, ke Eva estis la kaŭzo  
de mia alivestiĝo kaj de ĉiuj-ĉi okazintaĵoj — kaj efe-  
ktive la kaŭzo de ĉio, kio sekvas, estos Eva.

Mi ĉifas la leteron, kaŝas ĝin en la poŝon kaj  
mi enlitiĝas...

Svjatecki levas la okulojn for de sia laboro kaj  
rigardas min, atendente, ĉu mi ion ne diros, sed mi  
silentas.

— Estis tie-ĉi vespere post la teatra prezentado  
tiu malnobla Ostŝinski — diras Svjatecki.

## XVIII.

Morgaŭ matene, jam je la deka horo, mi volas kuri al Eva, sed estas neeble, ĉar mi havas gastojn.

Venas barono Kartofler kaj mendas duplikaton de miaj „Judoj“. Li proponas mil kvincent rublojn, mi postulas dumil. Li konsentas.

Post lia foriro mi ricevas mendon je du portretoj de Tanzenberg. Svjatecki, kiu estas antisemito, insultas min, nomante min juda pentristo, sed mi volus scii, kiu ĉe ni aĉetas artoverkojn, se ne la „financoj“. Sed se la „financoj“ timas la kadavrulojn de Svjatecki, tio ne estas mia kulpo.

Ĉe Eva mi estas nur je la unua horo; mi transdonas al ŝi la ringon kaj mi antaŭanoncas, ke post la edziĝo ni veturos Romon.

Enjo ĝoje konsentas kaj — kiom ni hieraŭ ambaŭ silentis, tiom hodiaŭ ni babilas unu tra la alia...

Mi rakontas al ŝi pri la mendoj, kiujn mi ricevis kaj ni ĝojas komune. La portretojn mi devas fini antaŭ la forveturo kaj la „Judojn“ por Kartofler mi pentros en Romo. Poste ni revenos Varsovion, mi aranĝos la laborejon kaj ni vivos kiel en ĉielo...

Farante tiujn projektojn, mi antaŭanoncas al Eva, ke dum la tuta vivo ni solenos feste la daton de la hieraŭa tago.

Sed ŝi kaŝas la kapeton sur mia ŝultro kaj petas, ke ni pri tio ne parolu. Poste ŝi ĉirkaŭvolvas mian kolon per la distranĉitaj manikoj de sia matenrobo kaj nomas min sia granda homo... Ŝi estas pli pala, ol kutime, ŝiaj okuloj estas pli violkoloraj ol kutime, sed ŝi radias de ĝojo.

Ah! Kia azeno mi estis, kiam, havante apud mian virinon, mi serĉis feliĉon aliloke, en sfero, en kiu mi estis tute fremda, kaj kiu estis fremda por mi...

Kian artistan naturon havas Eveto! Ŝi estas mia fianĉino, do ŝi entuziasmiĝas tuj por tiu rolo kaj malgraŭvole iom ludas la rolon de juna kaj feliĉa fianĉino. Sed mi tute ne riproĉas tion al la amata estaĵo, kiu tiom da jaroj estis en teatro.

Post tagmanĝo ni veturas al Hela Kolĉanovska.

De la momento, kiam Eva prezentis min kiel sian fianĉon, la artifiko kun la maljuna almuzulo fariĝas senkulpa kaj ne povas kaŭzi malkonsenton inter ambaŭ sinjorinoj. Kaj efektive Hela, sciiginte pri tio, akceptas nin korsente kaj estas feliĉigita per la feliĉo de Eva. Ni ridas kiel trio da frenezuloj pri la „did“, pri tio, kion la „did“ devis aŭskulti pri la pentristo Magorski. Hieraŭ mi volis mortpiki Ostŝinski'n, hodiaŭ mi admiras lian spritecon...

Hela ridas tiel, ke ŝiaj klaraj okuloj eĉ kovriĝas per larmoj. Dirante paranteze, ŝi estas belega. Kiam en fino de l' vizito ŝi flanken klinas la kapeton, mi ne povas deturni de ŝi la okulojn kaj Eva mem estas ĝis tia grado sub influo de ŝia ĉarmo, ke poste, dum



la tago, senkonscie ŝi imitas tiun kapoklinon kaj tiun rigardon...

Ni interkonsentiĝas, ke post la reveno el eksterlando mi pentros la portreton de Hela, sed antaŭe, en Romo, mi portretos mian Eveton, se mi nur scipovos transdoni tiujn trajtojn, tiel delikatajn, ke eĉ preskaŭ trorafinitajn, kaj tiun vizaĝon tiel senteman, ke ĉiu impresu respregulas sin en ĝi, kiel nubeto en klara akvo.

Sed mi scipovos, kial do mi ne scipovus?

La vespera „Fluganto“ anoncas nekredoblajn historiojn pri la mendoj, kiujn mi ricevis.

Miaj enspezoj estas kalkulataj laŭ miloj.

Eble tio estas iom la kaŭzo, ke la sekvantan tagon mi ricevas de Kazja leteron, dirantan, ke ŝi resendis al mi la ringon sub influo de kolero kaj ĵaluzo, sed se mi venos kaj se ni falos al piedoj de la gepatroj, la gepatroj permesos ankoraŭ elpetegisian pardonon.

Mi havas jam sufiĉe de tiu alpied-falado kaj de tiuj pardonoj. Mi tute ne respondas. Falu al iliaj piedoj iu alia, kaj Kazja edzigu Ostŝinski'n: mi havas mian Evon!

Tamen mia silentado evidente alarmas la familion de Suslovski'j, ĉar post kelke da tagoj la sama sendito venas kun letero de Kazja, sed tiufoje al Svjatecki.

Svjatecki montras al mi la leteron... Kazja petas lin, ke li venu interparoli momenton pri afero, de kiu dependas ŝia tuta estonteco, do ŝi fidus lian koron, lian honestecon, kiun ŝi divenis en li de la unua ekrigardo, kaj ŝi esperas, ke li ne rifuzos la peton

de malfeliĉa virino. Svjatecki malbenas, murmuras  
ion mallaŭte pri malnoblaj filistroj, pri la neceseco,  
pendigi ilin ĉiujn kune kun la idaro, ĉe unua okazo,  
sed li iras...

Mi konjektas, ke ili volas per li influi min...

---

## XX.

Svjatecki, kiu esence havas molan koron, evidente subjugiĝis.

Tutan semajnon li vizitas ĉiutage gesinjorojn Suslovski, kaj de tri tagoj li rondiras ĉirkaŭ mi, rigardante min malserene el sub la mallevita kapo, tute kiel lupoj...

Fine unu tagon, ĉe la teo, li demandas min malafable:

— Aŭskultu, kion vi intencas fari kun tiu knabino?

— Kun kiu knabino?

— Kun tiu Suslovska, aŭ kiel ŝi estas nomata?

— Nenion mi intencas fari kun tiu Suslovska, aŭ kiel ŝi estas nomata...

Sekvas momento da silento, post kiu Svjatecki ree diras:

— Ŝi ploregas tie dum tutaj tagoj, ke mi eĉ ne povas tion rigardi...

Jen, kiel honesta animo!

En tiu-ĉi momento ankaŭ lia voĉo tremas emocie, sed li gruntas kiel rinocero kaj aldonas:

— Honesta homo ne agas tiel.

— Svjatecki, vi komencas rememorigi al mi paĉjon Suslovski!

— Povas esti... mi preferas rememorigi paĉjon Suslovski, ol agi maljuste kontraŭ lia filino.

— Mi petas vin, lasu min trankvile.

— Bone! mi povas eĉ tute vin ne koni.

Tiel finiĝas nia interparolo, kaj de tiu-ĉi momento mi ne parolas kun Svjatecki.

Ni ŝajnigas, ke ni ne konas unu la alian, kio estas des pli amuza, ke ni loĝas ĉiam kune, trinkas matene la teon kune, kaj neniu el ni ambaŭ ekpensas forlasi la laborejon kaj ekloĝi aliloke.

La difinita dato de mia edziĝo kun Eva proksimiĝas...

Per interpero de la „Fluganto“ la tuta Varsovio scias jam pri tio... Ĉiuj rigardas nin, ĉiuj admiras Evon. Kiam ni estis en la ekspozicio oni ĉirkaŭis nin tiel, ke ni ne povis trapuŝi nin tra la amaso.

Mia nekonata amikino sendis al mi refoje anoniman leteron, en kiu ŝi avertas min, ke Eva ne estas ĝusta edzino por tia homo kiel mi...

„Mi ne kredas tion, kion oni rakontas pri la rilatoj inter fraŭlino Adami kaj sinjoro Ostŝinski, (skribas mia amikino) sed vi, majstro, bezonas edzinon, kiu oferus sin tute al via gloro kaj grandeco; kaj fraŭlino Adami estas mem artistino kaj ŝi, zorgante por si, forkondukos la akvon al sia propra muelejo...“

Svjatecki vizitas konstante Suslovski'jn, sed ŝajne jam kiel konsolanto, ĉar ja ankaŭ Suslovski'j devas scii pri miaj intencoj.

Mi ricevis por Eva nelimigitan forpermeson de

la teatra direkcio. Eva komencas frizi sin kiel vilaĝa sinjoridino, vestas sin tre modeste kaj surmetas vestojn butonumatajn ĝis la kolo. Tio ornamas ŝin treege.

La sceno, okazinta en la vestejo, ne ripetiĝis eĉ unu fojon. Eveto ne permesas! Maksimume mi havas la rajton kisi ŝiajn manojn. Tio malpanciencigas min senmezure, kaj mi flatas al mi, opiniante, ke ankaŭ ŝin...

Ŝi amas min pasie. Tutajn tagojn ni pasigas kune. Mi komencis doni al ŝi lecionojn de desegnado.

Ŝi treege ŝatas tiujn lecionojn kaj la pentrarton ĝenerale.

---

## XXI.

Ho Zeŭso fulmbatanta! kion vi rigardas el supro de via Olimpo.

Okazas aferoj, pri kiuj ne sonĝis la filozofoj.

Antaŭtage de mia edziĝo venas al mi Svjatecki, ekpuŝas min per kubuto kaj flanken turnante sian distaŭzitan kapon, li diras malserene:

— Vladek, ĉu vi scias? mi plenumis krimon.

— Nu, fine vi ekparolis! mi respondas — kian krimon?

Svjatecki rigardas ĉiam la plankon kaj parolas kvazaŭ al si mem:

— Ĉar, se tia drinkulo kiel mi, tia idioto sentalenta, tia bankrotulo morala kaj fizika edzinigas tian knabinon, kiel Kazia, tio estas vere krimo!

Mi ne kredas miajn orelojn, tamen mi impete ĉirkaŭbrakas la kolon de Svjatecki, ne atentante tion, ke li min forpuŝas.

Lia edziĝo okazos post kelke da tagoj...

---

## XXII.

Post kelkmonata restado en Romo, mi kun Eva ricevas grandiozan karton, invitantan nin al la edziĝa ceremonio de Ostŝinski kun sinjorino Helena Turno, primo voto Kolčanovska.

Ni ne povas veturi, ĉar la sano de Eva ne permesas tion.

Eva pentras ĉiam kaj faras grandegajn progresojn. Mi ricevis medalon en Buda-Peŝto. Iu kroata riĉegulo aĉetis mian pentraĵon. Mi kontraktis ankaŭ rilatojn kun Goupil.

---

XXIII.

En Verono naskiĝas al mi filo...  
Eĉ Eva mem diras, ke tian infanon ŝi neniam  
vidis...  
Eksterordinara!...

---



#### XXIV.

De kelke da monatoj ni estas en Varsovio.

Mi aranĝis grandiozan laborejon.

Ni vizitas sufiĉe ofte Ostŝinski'jn.

Li vendis la „Fluganton“ kaj estas nun „prezidanto de Societo por disdonado de hordea grio al laboristoj senigitaj de okupo“. Nenio povas doni ideon pri lia grandanimeco kaj pri la estimo, kiu lin ĉirkaŭas. Min li frapetas sur la ŝultron kaj diras al mi: „nu, favoranto!“ Li protektas ankaŭ literaturajn talentojn kaj akceptas ĉe si ĉiumerkrede.

Ŝi estas ĉiam belega, kiel sonĝo...

Infanojn ili ne havas.

---

XXV.

Savu! aŭ mi mortos de rido...

El Parizo alveturis gesinjoroj Svjatecki. Ŝi aprenas pozojn kiel edzino de artisto el la „ora ciganaro“; li portas silkajn ĉemizojn, egale tonditan fruntharaĵon kaj barbon kojnforman... Ĉion mi komprenas! mi komprenas, ke ŝi povis ordigi liajn kutimojn, la karakteron, sed kiamaniere ŝi ordigis lian distaŭzitan kapharaĵon, tio restos por mi eterna enigmo.

Svjatecki ne ĉesis fari „kadavrulojn“, sed li pentras ankaŭ bildojn idiliajn. Li havas multe da sukceso. Li faras ankaŭ portretojn, sed tiuj ĉi malpli prosperas al li, ĉar ilia haŭtkoloreco rememorigas ĉiam la „kadavrulojn“.

Mi demandis lin kiel malnova amiko, ĉu li estas feliĉa kun sia edzino. Li diris al mi, ke li neniam revis pri simila feliĉo. Mi konfesas, ke Kazja montrigis, en bona senco, alia ol mi esperis.

Ankaŭ mi estus tute feliĉa, se ne estus tio, ke Eva bedaŭrinde komencas malsaneti kaj krom tio estas ofte tre incitita. Mi aŭdis foje nokte, kiel ŝi ploris. Mi scias la kaŭzon! Ŝi sopiras al teatro. Ŝi silentas, sed sopiras...

Mi komencis la portreton de sinjorino Ostŝinska. Simple dirante, nekomparebla virino! La konsidero je Ostŝinski ne detenus min ja... Kaj se ne estus la cirkonstanco, ke mi ĝis nun treege amas Kazjon, tiam mi ne sciis...

Sed mi treege amas Evon — treege!

FINO.




It is a very common mistake to suppose that the  
of a man's mind is the same as the  
of a man's body. The mind is not a  
thing that can be seen or touched. It is  
a power that can be exercised in many  
ways. It is the power that makes us  
think and feel. It is the power that  
makes us do good and bad. It is the  
power that makes us happy and sad.  
It is the power that makes us  
what we are.

## ALIAJ VERKOJ DE L'SAMA AŬTORO

---

	Rub.
La juĝo de Oziris, trad. el H. Sienkiewicz (eldon. Jan Günther) . . . . .	0,25
Kio okazis foje en Sidono, trad. el H. Sienkiewicz (Jan Günther) . . . . .	0,25
Consilium facultatis, trad. el Fredro (Jan Günther) . . . . .	0,40
Nova Antologio (poezia) (Jan Günther) . . . . .	0,25
La tagiĝo (Kun notoj) (Jan Günther) . . . . .	0,10
Kiel rompita vente arbeto. El opero Halka (kun notoj) (Jan Günther) . . . . .	0,10
Libroj de Profetoj (poemoj) el A. Lange (Jan Günther) . . . . .	0,15
Ŝi, la tria, trad. el H. Sienkiewicz (Jan Günther) . . . . .	0,50
Pekoj de l'infaneco, trad. el B. Prus (Jan Günther) . . . . .	0,50
Granda Vortaro Pola-Esperanta (M. Arct) . . . . .	1,60
Malgranda Vortaro Pola-Esperanta (M. Arct) . . . . .	0,90
La Liro de Esperantistoj (M. Arct) . . . . .	0,60
Kondukanto de l'interparolado kaj korespondado kun Antologio internacia (Hachette et Cie) . . . . .	Fr. 2
Mazepa, trad. el Słowacki (Hachette et Cie) . . . . .	„ 1
Halka, trad. el W. Wolski (Hachette et Cie) . . . . .	„ 1

---



45

801050/11325

Antykar. DK  
W-wa, 21.04.75.  
-45. w.


Prezo Rub. 0.50.

---

Drukarnia L. Bogusławskiego, Warszawa, Świętokrzyska 11.

42







Biblioteka Narodowa  
Warszawa



30001024205335

BN



849929

---

---

